

Kiam eŭro venos al Litovio?



Monato

27a jarkolekto - marto 2006/3

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

La fino de l' mondo



OPINIO:

Malpaciga pacpremio


LIBROJ:

Taglibroj de murdita infano

Pro la granda sukceso...
nun jam la tria parto

Leksikaj ekskursoj

de Emile Van Damme kaj Christiane De Vleminck



En esperantistaj medioj al la socia vivo certe ne mankas vicleco kaj aktiveco. Tamen, ĉu la konversacio de tempo al tempo ne suferas pro vortprovize trua vojo? Por ŝtopi tiujn truojn jen estas tri volumoj plene da Leksikaj Ekskursoj!

- Maria, vi kisadis la leterportiston, ĉu ne?
- Jes, sinjorino, mia patrino sendis al mi per poŝtkarto mil kisojn kaj la leterportisto donis ilin al mi.

tri libroj kune
30€ (anstataŭ 40,90€)

Volumo 1: 11,90 € + afranko
Volumo 2: 14,00 € + afranko
Volumo 3: 15,00 € + afranko
Volumoj 1 ĝis 3 samtempe menditaj: 30,00 € + afranko

- La kioma estas?
- Kvin antaŭ.
- Kvin antaŭ kio?
- Mi ne scias. Mi perdis la etan montrilon.

Malpaciga pacpremio 11



Konsternis la aŭtoron taggazeta informo, ke norvega parlamentano kandidatigis sinjorinon Ayaan [ajan] Hirsi Ali por la Nobelpremio pri paco. Tuj la aŭtoro reagis: „Ŝi ja sisteme semas malamon kontraŭ islamo kaj kontraŭ ĉio islama. Do kiel eblas?”

14 La fino de l' mondo

Ĉe la suda limo de la amerika kontinento estas insularo, kiu ĉiam ankoraŭ allogas maristojn kaj aventuremulojn.



Ŝtormoj, altaj ondoj, nebuloj, ŝipdronoj estas eroj de ĝia historio. La nomon de la insularo „*Tierra del Fuego*” (Fajrolando) donis Magelano (hispane Fernando de Magallanes, portugale Fernão de Magalhães) en 1520 pro la multaj fajroj, kiujn la indiĝenoj kutime faris por sin varmigi, eĉ ene de siaj kanuoj.

Kiam eŭro venos al Litovio 17



En Litovio ofte aŭdeblas, ke la jaro 2006 estas la lasta, kiam en la lando cirkulas la nacia valuto lido. Ekde la 1a de januaro 2007 ĝin devus anstataŭi la eŭropa valuto eŭro.

Tamen ĉu vere okazos tiel, kiel asertas la aŭtoritatoj de la lando, ne estas centprocente klare.

21 Taglibroj de murdita infano

Recenzo de rekomendinda libro, ne pro literaturaj kialoj, sed pro sia historia memorigo pri la sorto de senkulpuloj, pro la agado de frenezaj registoj, kiuj majstris la arton de ŝtatterismo.



POLITIKO

Liberio	8
Unua prezidantino afrika	
Litovio	8
Ŝerci serioze	
Albanio	9
Ne flugas la birdo	
Balkanio	9
Mortis porpaca batalanto	

MODERNA VIVO

Japanio	10
Ŝrumpanta lando, kreskanta ŝanco	
Kiam beboj fariĝas malbeboj	
Opinio	11
Malpaciga pacpremio	
Kordoloro	12
Forpasis mia karulinio	
Hungario	13
Stelegoj inter libroj	

TURISMO

Argentino	14
La fino de l' mondo	

EKONOMIO

Eŭropa Unio	17
Kiam eŭro venos al Litovio?	
Serbio-Montenegro	18
Novi Beograd disvolviĝas	

KOMPUTADO

Libera programaro	19
Novaj versioj iĝis pli bonaj, sed restas mankoj	

LIBROJ

Valora pripensindaĵaro	20
Taglibroj de murdita infano	21

NOVELO

En fremda lando	23
------------------------------	----

ENIGMO

Sudoko-puzloj	26
----------------------------	----

Abonoj	4
Enkonduko	5
Leteroj	6
El mia vidpunkto	7
Anoncetoj	27

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank, 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko traktata je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	25	5	10
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	50	5	9
Brazilo	EUR	23	25	5	10
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	25	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	25	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	42	5	10
Hungario	EUR	23	25	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	42	5	10
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6600	6900	860	1220
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	42	5	10
Kroatio	EUR	23	25	5	9
Latvio	EUR	23	25	5	9
Litovio	EUR	23	25	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	370	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugalio	EUR	36	41	5	9
Rusio	EUR	23	25	5	9
Singapuro	EUR	41	42	5	10
Slovakio	EUR	23	25	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	42	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	71	82	9	14
Tajvano	EUR	41	42	5	10
Usono	USD	61	63	8	13
Bazo eŭropa	EUR	46	50	5	9
Bazo ekster-eŭropa	EUR	48	50	5	10

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiiilo +32 32 33 54 33.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: esperfed@ans.com.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craighenhill Road, Kilncadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variabi. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estono:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Francia:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:** Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
- **Literatura-Servo "Espero",** Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
- **Hans Dieter Platz,** Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- **Wolfgang Schwanzer,** Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto-ct.org.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Italaj:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japanaj:** KLEGG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. Reto: kleg@mvf.biglobe.ne.jp.
- **Japano Esperanto-Instituto,** Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwioleskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto-ct.org.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperant@unitel.co.kr
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miauguau@racsa.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: stralaim@takas.lt.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Skribu al la eldonejo kaj pagu al Danuta Leyk, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328@PKO BP XIV O/Wwa.
- **Ruslandaj:** Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
- **Mikaelo Ĉertilov,** Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:** Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
- **Sveda Esperanto-Federacio,** c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, S-242 94 Hörby. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Faks: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org
- **Venezuela:** Peter Jaimez, Apartado 3482, Caracas 1010A. Reto: peterjaimez@tutopia.com.



Reta demokratio

Interreto, tiel oni diras, ne nur akcelas demokration, sed mem estas demokrata afero. Efektive, ĉar praktike ĉiu en ĉiu lando (teorie) povas aliri ĝin, tiu ĉi komunikilo ene de nur kelkaj jardekoj iĝis plej vaste uzata. Oni trovas en la reto ĉion ajn, ne nur rubaĵojn (ili ja abundas), sed ankaŭ valorajn informojn, tute libere. Landlimoj ne baras ĝin, do ankaŭ en ŝtatoj ne nepre demokratiaj la homoj povas akiri sciojn pri la tuta mondo, pri ĉiuj sciencoj kaj kulturoj, pri ĉiuj politikaj sistemoj. Kontrolado estas malfacila, do eĉ en severaj diktaturoj homoj povas ofte havi kontaktojn kun personoj en liberaj socioj kaj ekkoni la enhavon de retmesaĝoj, kiuj ne konvenas al la kernitaj reĝimoj.

Tamen certa regado (se vi volas: cenzuro) necesas eĉ en plej liberaj socioj; ekzemple probable neniu kontestas, ke oni devas fari ĉion por protekti infanojn kontraŭ pornografiaj enhavoj. Apartan respondecon en tio havas serĉ-programoj. Kaj tia regado, barado de certaj enhavoj ja eblas teknike, kvankam ruzuloj ĉiam denove eltrovas rimedojn por elturniĝi, same kiel aliaj krimuloj daŭre sukcesas per novaj virusoj superruzi ĉiujn protektilojn. Kompreneble ankaŭ diktaturoj volas trudi al tiaj serĉprogramoj siajn cenzurojn. Ĉe malgrandaj landoj la koncernitaj kompanioj povas neglekti tion, sed kion fari, kiam temas pri grandega ŝtato? Tiel nun ankaŭ la plej potenca serĉoservo, la usona Google (la Esperanto-vorto „guglo” konvene markas gigantan nombron) koncedis al la ĉina registaro, cenzuri enhavojn. En la ĉina interreta pordego *www.google.cn* oni ne plu trovas ekzemple informojn pri la iama masakro en la Placo de Ĉiela Paco, Tibeto, Tajvano, homaj rajtoj kaj demokratio. Onidire 40 000 cenzuristoj en Ĉinio kontrolas la reton.

Do reta demokratio en Ĉinio ne realas, ĉar Google volas profiti de la giganta merkato de miliard-homa lando – ĝi ja ne estas morala instanco sed komerca entrepreno, ĉu ne? Estus interese scii, ĉu legantoj en Ĉinio ekzemple sukcesas trovi en la reta versio de nia revuo tiun ĉi artikolon. Sed kiu povus informi nin?

Sincere via

Stefan MAUL

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 27a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajtoj ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, menu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiiilo: +32 3 233 54 33; retpoŝto: monato@fel.esperanto.be, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinktitita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: s.h.maul@t-online.de

reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.

grafiko:

Ferriol Macip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Reto: moonmont@pt.lu.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Reto: rotsaert@esperanto.be.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 59, B-4700 Eupen, Belgio. Reto: jp@fel.esperanto.be.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: Evgeni.Georgiev@gmx.at.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: edmund820@rano.org.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: monato-leteroj@fel.esperanto.be.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: b_kolker@yahoo.com. **Nota:** Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro propraincicie. La kunlaborantoj ricevas la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: syama@qf6.so-net.ne.jp.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: mgglez@enet.cu.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: paulgubbins@tiscali.co.uk.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Jãoa Motter 98, 81210-260 Curitiba, PR, Brazilo. Rete: gmattos@brturbo.com.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: paulgubbins@tiscali.co.uk.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: teccardt@hotmail.com
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: gerrit.en.madzy@planet.nl.
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: grigorij@lenta.ru.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: s.h.maul@t-online.de.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: Evgeni.Georgiev@gmx.at.

Reta versio

Mi tute ne interesiĝis pri la reta versio de MONATO ĝis antaŭ kelkaj monatoj. Mi kutimas legi revuojn en la vivĉambro, en komforta fotelo, kaj tute ne ĉe skribtablo. Sed ekde kiam mi havas porteblan komputilon, mi kunportas ĝin de mia laborĉambro kaj volonte legas la elektronikan version de MONATO same komforte kiel la paperan. Kaj nun mi ĝuas la pli rapidan aperon kaj la kolorajn bildojn. Mi speciale aprezas la fakton, ke la paĝoj estas muntitaj unu sub la alia (anstataŭ paro da paĝoj unu apud la alia, kiel okazas por la revuo *Esperanto* de Universala Esperanto-Asocio, UEA). Tio signifas minimumajn ŝovojn dum la legado.

Ivo DURWAELE
Belgio



Kial sensencige „plibonigi“?

Malavantaĝo de la iom komplika redaktora sistemo de MONATO estas tio, ke post plurfoja redaktado kaj reviziado, la vera intenco de la aŭtoro kelkfoje perdiĝas. Ekzemple, la antaŭlasta frazo de mia artikolo *La gaela romanarto* (MONATO 2005/12, p. 13) originale tekstis: „Ĉu fina glora *novaa* brilego de mortanta stelo aŭ revigliĝo de eta kaj preskaŭ forgesita kulturo?“ Post „pliboniĝo“, ĝi iĝis: „Ĉu fina glora *nova* brilego ...“ ktp. Laŭ *Plena ilustrita vortaro* (PIV), la astronomia termino *novao* signifas: „Stelo, kiu abrupte aperas, brilegas tre bele dum kelka tempo, k[a]j poste regule malbriliĝas ĝis nevidebleco ...“ La „plibonigita“ versio signifas precize la kontraŭon de la originala senco. *Novao* estas mortanta, ne nova stelo. Mi kredas, ke mia uzo de la termino estas trafa metaforo por eble malaperanta lingvo. Kiel asertis Pilato en la biblio: „Kion mi skribis, tion mi skribis.“

Garbhan MACAOIDH
Irlando

Angie kaj Bush

La vidpunkto de la ĉefredaktoro Stefan Maul pri la katastrofo en Irako (MONATO 2006/1, p. 7) resumas bonege la faktojn. Gratulojn!

La temo treege gravas kaj ŝajnas esti ridinde atentigi la redaktoron pri tre eta detalo. Trifoje en la artikolo Stefan aludas al *prezidanto* Bush anstataŭ al „prezidento“ Bush. Ni certe devus distingi inter ŝtatestro kaj iu persono, kiu nur prezidas aferon.

Koncerne la vorton „kancelierino“ (2006/1, p. 5) (kiu laŭ mi facile prononceblas), oni ĉiam supozis, ke se la sekso de persono estas memklara, la *in*-sufikso superfluas. *Angie* certe fierus pri la senseksa titolo „kanceliero“.

Vilĉjo SIMCOCK
Britio

Buĉado de la angla

Rilate al la artikolo de ĉefredaktoro Stefan Maul en la januara MONATO (p. 5) la subskribinto havas du komentojn.

La sufikso „in“: Kial germanoj havas tiun frenezan emon emfazi la sekson, kvankam fakte temas pri titolo, pozicio aŭ profesio? „Karaj kuncivitaninoj, karaj kuncivitanoj!“ oni ja aŭdas en la germanaj televido kaj radio. Ĉiu tamen scias, ke la popolo konsistas el homoj de ambaŭ seksoj kaj ĉi tie la emfazo kuŝas sur civitaneco, ne sur la maskleco aŭ ineco. Stefan Maul skribas tute normale, ke Angela Merkel estas „partiestro“, sen ajna inumado. Bedaŭrinde, ke la protokolo-oficejo en Berlino decidis pri la titolo de federacia kanceliero favore al la ina formo. Ĉu „Anĝelino“ mem postulis tion? Kion ajn la etiketo kaj lingvouzo en Francio diktas en oficialaj situacioj, francaj virinoj certe ĉi-koncerne ĉiam havas kompleksojn pri sekso. Demandite: „Vi estis instruisto, ĉu ne?“, francino respondis: „Ne, mi estis instruistino.“ (Ĉiuj nefrancaj esperantistoj en la ĉambro ridis.) Frazoj kiel: „Ŝi estas fizikistino“ aŭ „D-rino M. faris prelegon“ estas do sinklarigaj.

Due, la prononco: Kvankam angle la vorto *angel* (anĝelo) estas prononcata [ejnĝl], la nomo *Angela* kaj la usona urbo *Los Angeles* tute ne enhavas tiun sonon [ejn]. La vokalo estas pli proksima al la sono [a], ol al la sono [e]. Mi spertas etan naŭzoŝokon, kiam ajn mi aŭdas germanojn prononci la nomon de tiu usona urbo (eĉ homoj kun bonaj ĝeneralaj scioj pri la angla ne kapablas fari tion). Mi dubas, ĉu eĉ eblus instrui la prononcon de la angla al la „adorantoj de la angla lingvo“, ĉar ili gaje kaj konstante daŭrigas la buĉadon kaj misuzon de la angla, ĝis plena ner-koneble en la adorata de ili lingvo.

Helga RAPLEY
Francio

Kiel sendi viajn leterojn?

Sendu viajn leterojn por tiu ĉi rubriko al:

Flandra Esperanto-Ligo, MONATO
Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen Belgio
Telekopiiilo: + 32 3 233 54 33.
Retpoŝte: monato-leteroj@fel.esperanto.

Pri la enhavo de la leteroj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktanto havas la rajton mallongigi leterojn.
Reagoj al aperintaj artikoloj havas prioritaton.

Diktatoroj dorlotataj

de Stefan MAUL

La diktatoron de Irako, per sanga milito, detronigis Okcidento kun Usono ĉepinte. Sed saman sorton multaj aliaj diktatoroj ne timu – male: oni dorlotas ilin. Ni prenu nur kvar ekzemplojn el Afriko: Etiopio, Ugando, Eritreo kaj Ruando. En ĉiu el ili regas despotoj, tamen Okcidento dorlotas ilin per respekto kaj, precipe, mono.

Enigma

La ĉefministro de Etiopio Meles Zenavi estas bone akceptata gasto en Eŭropo. Lia brita kolego vokis lin en sian Afriko-komisionon, antaŭ nelonge li gastis ĉe la germana prezidanto kiel „esper-portanto de la kontinento”, kaj dum la G8-pinto en Skotlando oni ne nur laŭdis lin pro bona regado, sed ankaŭ nuligis ĉiujn eksterajn ŝuldojn de la ŝtato. Estas enigma, kial Okcidento tiom dorlotas tiun despoton. Sole post la elektoj en majo 2005 la armeo mortigis pli ol cent homojn (inter ili infanojn) dum manifestacioj kontraŭ la reĝimo, pli ol dek mil homoj vegetas en karceroj, inter ili la tuta gvidantaro de la opozicio; ili estas akuzitaj pro ŝtatperfido kaj – plej absurde – genocido. La kialo estas simpla kaj klara: ĉe la elektoj la opozicio venkus, se oni ne manipulus la nombradon de voĉoj.

Ankaŭ la prezidanto de Ugando Joveri Museveni estas dorlotata de Okcidento, li ricevas ekzemple grandan parton de germana evoluhelpo, lian landon same la G8-pinto senŝuldigis. Sed Museveni, kiu diktatoras jam dum 19 jaroj, same brutale, kiel Zenavi, persekutas kontraŭulojn. Ankaŭ la uganda opoziciestro estas akuzita, pro ŝtatperfido kaj seksperforto (?). Ke ne temas pri politika proceso, oni ne kredas eĉ en la lando mem.

HELENE C. STICKEL



La diktatora prezidanto de Ugando, Joveri Museveni, vizitis la usonan Pentagonon, la 13an de junio 2003.

Promesoj

Diktatoro Isaias Afeverki en Eritreo estas evidente paranoja; lian landon oni plej trafe karakterizas kiel gigantan militistan karceron. Ankaŭ Paul Kagame en Ruando subpremas sian popolon per fera pugno. Tamen ĉiujn tiujn despotojn okcidentaj politikistoj antaŭ nelonge gloris kiel „novajn gvidantojn de Afriko”, ĉar ili promesis demokration, homajn rajtojn, ekonomi-reformojn kaj pli bonan estontecon por siaj popoloj. Oni abunde donacas al la diktatoroj monon. Etiopio ricevas 40 % de la ŝtat-buĝeto rekte el Okcidento,

Ugando kaj Ruando eĉ pli ol 60 %. Sed kial? Demokration, bonan regadon kaj homajn rajtojn oni vidas nenie en tiuj ŝtatoj.

Kritikantoj ofte parolas pri Afriko kiel „forgesita kontinento”, tamen ŝajnas, ke ĝuste despotoj tie ne estas forgesitaj, sed dorlotataj per milionoj da eŭroj kaj dolaroj. Kial? Certe, la *popoloj* bezonas helpon kaj monon. Sed la okcidenta evoluhelpo devus ne cementi despotajn reĝimojn, ĝi devus akceli demokration kaj homajn rajtojn. Aŭ ĉu mi miskomprenas ion? ■

LIBERIO

Unua prezidantino afrika



Ellen Johnson-Sirleaf

Demokratie elektiĝis en Liberio la unua prezidantino afrika. En januaro Ellen Johnson-Sirleaf, 67-jaraĝa, iama financ-ministro kaj eksa afrika direktoro de la Evoluiga Programo de Unuiĝintaj Nacioj, venkis sian ĉefan oponenton, la popularan eks-futbaliston George Weah.

Afrikaj feminismaj organizaĵoj bonvenigis la venkon, sed komentariistoj daŭre diskutis, ĉu la voĉdonado estis influata de registaroj kaj en kaj ekster Afriko. Ekzemple, Niĝerio kaj Usono indikis sian preferon por s-ino John-

son-Sirleaf, kiu venkis kun 59 % de la voĉoj. Ŝiaj subtenantoj atentigis, ke ŝi estis kandidato pli sperta kaj pli bone edukita ol la futbalisto, kies kroma civitaneco belga minacis dum la elekto-kampanjo bari lin el la elektoj.

La nova prezidantino certigos, ke Weah membriĝos en transpartia nacia registaro por garantii pacon kaj stabilecon en Liberio. La lando suferadis pro jardekoj da interna milito kaj multaj eks-soldatoj, inter kiuj junuloj, estis subtenantoj de Weah. Nepras nun rekonstrui frakasitan ekonomion.

Princo Henriko OGUINYE/pg

LITOVIO

Ŝerci serioze

Protestis gejunuloj en Litovio kontraŭ la intencoj vendi akciojn de la plej granda nafto-kompanio (*Mazeikiu nafta*) en la baltaj ŝtatoj al rusa kompanio.

Antaŭ la laborejo de la ĉefministro Algirdas Brazauskas prezentis sin gejunuloj vestitaj en uniformoj el la

sovetia epoko. Alveninte per malnova kaj iam prestiĝa rusa aŭtomobilo *Volga*, du soveticaj aŭtoritatuloj deklaris, ke ili aĉetos ne nur petrolan uzinon en Mazeikiai, sed ankaŭ kastelojn kaj la katedralan placon en Vilniuso. Poste ili portis „honoran leteron” pri interpopola amikeco – dum la soveticaj periodo la

plej honora dankesprimado – al la registaro.

La organizantoj intence elektis tian proteston. Ili maltrankviliĝas pri la cinikeco de la registaro, kiu senkaŝe protektas kompaniojn kaj ilin privatigas per rusa kapitalo.

LAST/pg

La protestantoj alvenas per iam prestiĝa rusa aŭto „Volga”.



Gejunuloj, en iamaj soveticaj uniformoj, protestas kontraŭ la cinikeco de la litova registaro rilate uzon de rusa kapitalo.



Ne flugas la birdo

En novembro 2005 ekestis disputo inter la albana registaro kaj la ĉefurbo Tirano. Temas pri la nuligo de jam konstruata aŭto-pasejo ĉe ĉefa vojkruciĝo ekster la urbo ĉe loko, nomata Zogu i Zi (Nigra Birdo). La laboro komenciĝis en aprilo 2005. Kontraŭ ĉirkaŭ du milionoj da usonaj dolaroj ĝi estus solvinta trafikproblemojn ĉe unu el la enirejoj en la urbon.

La registaro opinias, ke la projekto, jam duone efektivigita, enhavas gravajn teknikajn mankojn, kiuj endanĝerigus la vivon de uzantoj. Cetere la konstrufirmao, *Euroteorema*, ne estas licencita de la urbodomo de Tirano. Leviĝis ankaŭ demando pri korupto flanke de urbodomanoj. En la ĉefurbo oni taksas la problemon politika.

Konsilio de Eŭropo

Sendependaj observantoj vidas malantaŭ la disputo konflikton inter la registaro, estrata de la demokratoj de Sali Berisha [beriŝa], kaj la ĉefurbo,



Vera konfuziĝo ĉe la vojkruciĝo de Zogu i Zi, pro la laboraĵoj faritaj tie, decembrofino 2005

regata de socialistoj sub la urbestro Edi Rama. En- kaj ekster-lande Rama, kiu plendis ĉe la Konsilio de Eŭropo en Strasburgo, prezentas la disputon kiel misuzon kaj altrudon de la landa potenco malfavore al la loka, malgraŭ leĝoj pri la rilatoj inter la potencoj.

Ankoraŭ restas demandoj pri korupto flanke de Rama kaj pri la deziro flanke de la registaro forigi la urbestron

dum la venontaj, ĉi-jaraj elektoj. Krome estas strange, ke Rama rifuzas diskuti la problemon kun spertuloj de la registaro kaj mem prezenti al ili siajn proprajn argumentojn.

Intertempe pli kaj pli da homoj en Tirano enplektiĝas en la afero. Sed, laŭ albana proverbo, „kiam kverelas la ĉevalrajdistoj, suferas la ĉevaloj”.

Bardhyl SELIMI

Mortis porpaca batalanto

Forpasis en januaro Ibrahim Rugova, prezidanto de Kosovo. Albanoj en Kosovo, kaj aliaj, esperis, ke Rugova sukcese realigos siajn klopodojn por difini novan politikan statuson en la regiono, sed nun la taskon plenumos iu alia.


Rugova, kiu naskiĝis en 1944, estis literaturisto, kiu fariĝis en 1989 prezidanto de la unua albana opozicia partio en eksa Jugoslavio. Poste, pro sia paca rezistado kontraŭ Slobodan Milošević [milóŝević] kaj la serboslava okupado de Kosovo, li estis konsiderata iu „Gandhi de Balkanio” kaj ricevis de la Eŭropa Parlamento la pacpremion „Saĥarov”. Rugova mortis pro kancero.

Bardhyl SELIMI



JAPANIO

Ŝrumpanta lando, kreskanta ŝanco



pli ol 64 jarojn (en 2005, 20 %). Tamen oni ne parolu pri krizo. Japanio estas malgranda lando kun malriĉaj naturfontoj kaj japanoj tro multe laboras por teni sian ekonomie prosperan vivnivelon. Do estas tempo ŝanĝi ĉi tiun principon kaj vivi harmonie kun aliaj landoj kaj kun la naturo. Anstataŭ paroli pri krizo, oni parolu pri granda ŝanco por modele vivi en la 21a jarcento.

HORI Jasuo/pg

Unafoje post 1899 la nombro de japanaj mortintoj superis tiun de naskiĝintoj. Fine de la pasinta jaro la japana registaro anoncis, ke en 2005 la nombro de naskiĝoj estis 1 067 000 kaj la nombro de mortoj 1 077 000.

Ke tiel ŝrumpas Japanio, rezultas de pluraj faktoroj. Unue temas pri altaj viv- kaj loĝ-kostoj. Salajroj ne altiĝas, male impostoj. Tio signifas, ke multaj gepatroj ne povas toleri la eduko-kostojn de siaj idoj: kotizoj ĉe infanvartejoj kaj ankaŭ ĉe universitatoj plialtiĝas.

Alia kialo rilatas al laborhoroj. Preskaŭ du trionoj de la homoj inter la aĝoj de 30 kaj 39 revenas hejmen post la 20a horo kaj preskaŭ unu triono eĉ post la 22a. Virinoj inter tiuj ĉi aĝoj revenas meze iom antaŭ la 19a horo. Tial ili ne havas tempon por infanoj.

Kariero

Krome en Japanio virinoj preferas labori anstataŭ patriniĝi. Malfacile estas havi bebon kaj teni karieron. Alia kialo: pli ol duono de la laboristoj inter la aĝoj de 20 kaj 24 ne havas firmajn

postenojn: ili malmulton perlaboras kaj estas en situacioj tre malstabilaj. Rezulte ili ne geedziĝas kaj tial, laŭ statistikoj, ne naskiĝas ĝis eble 28 000 beboj.

Prognoze estas, ke en la jaro 2050 vivos 100 milionoj da japanoj (en 2005 estis 128 milionoj), el kiuj 35 % havos

Kiam beboj fariĝas malbeboj

En la periodo 1947-1949, do post la dua mondmilito, naskiĝis en Japanio granda nombro da beboj – pli ol du milionoj. Ili apartenas al la generacio, kiu multe kontribuis al la ekonomia progreso de Japanio, sed ekde la jaro 2007, kiam ili atingos 60 jarojn, ili komencos emeritiĝi.

Jam videblas ŝanĝiĝoj en la socio, kiuj spegulas la bezonojn de tiu ĉi generacio. Turismo-agentejoj celas pli aĝajn homojn, proponante pasigi feriojn en – por japanoj – nekutimaj lokoj, kiel ekzemple Islando, kien ne rekte flugas aviadiloj el Japanio. Aliaj kompanioj konstruas luksajn apartamentojn por emeritoj, kiuj ne plu volas prizorgi ĝardenojn, sed deziras profiti de urba kulturo.

Kafejoj

Furoris antaŭ 40 jaroj t.n. kanto-kafejoj en grandaj urboj. Tie junaj laboristoj kaj studentoj renkontiĝis por kanti precipe rusajn folklorajn kantojn. Nuntempe reaperas la kafejoj, frekventataj tamen de maljunuloj.

Tamen ne ĉio bonas. Bizare, ĉar homoj pli longe vivas, sed ne ĉiam sane, la vinda-industrio atendas, ke baldaŭ ĝiaj pli bonaj klientoj estos ne beboj, sed malbeboj. Kaj okazas t.n. limaĝaj divorcoj, kiam edzoj, kiuj kutimis longe labori ekster la hejmo, ĝin ne plu forlasas kaj komencas tie diktatori.

Ofte la edzoj, kiuj laboris kvazaŭ sklavo en siaj kompanioj, ne posedas la necesajn talentojn por vivi harmonie en hejmo aŭ komunumo. Pro tio, kiam oni enketis: „Kun kiu vi volas resti eksterlande?“, 75 % de la edzoj respondis „kun la edzino“, sed nur 42 % de la edzinoj respondis „kun la edzo“.



Malpaciga pacpremio

Konsternis min taggazeta informo, ke norvega parlamentano kandidatigis sinjorinon Ayaan [ajan] Hirsi Ali por la Nobelpremio pri paco. Tuj mi reagis: „Ĝi ja sisteme semas malamon kontraŭ islamo kaj kontraŭ ĉio islama. Do kiel eblas?”

Jam de kelkaj jaroj la konservativa parlamentano Hirsi Ali estas konata en Nederlando pro sia „batalo”: ŝi komencis pledi kontraŭ la tiel nomata virina cirkumcido, kiu fakte ne estas cirkumcido, ĉar virinoj ne havas penis, kiun eblas cirkumcidi. Efektive temas pri grava mutilo de la vagino, parta fortranĉo de la vaginaj lipoj. La granda plimulto nederlanda apogis ŝian kampanjon, kaj oni plidetigis la koncernajn leĝojn por puni tian agadon.

Malhumana

Sed baldaŭ Hirsi Ali komencis ataki ne nur tian misagadon kontraŭ junaj knabinoj, sed islamon ĝenerale, ĉar tia vagina mutilo okazas precipe inter homoj

devenaj el Somalio (de kie ankaŭ ŝi mem devenas) kaj apudaj regionoj en Afriko, kaj plej ofte en islama medio. Laŭ Hirsi Ali temas pri islama kutimo, kaj ĉar ĉi tiu kutimo estas malhumana, kaj islama, do islamo ne taŭgas.

Depost tiam, kune kun la murdita filmisto Theo van Gogh [fan hoh], ŝi interalie produktis filmon pri nudaj virinoj, kiuj estas fie traktataj de siaj – laŭdire islamaj – edzoj. Por pli insulti islamon, la korpojn de la nudulinoj oni pripentris per citaĵoj el la Nobla Korano – por piaj islamanoj klara blasfemaĵo.

Ke pro tio oni murdis sinjoron van Gogh, kompreneble ne estas akcepteble: murdo ĉiam estas krimo. Sed la filmo estis klare celita por insulti islamon. Nun-



Ayaan Hirsi Ali kandidatas por la Nobelpremio pri paco

tempe Hirsi Ali estas faranta duan filmon por plifortigi la atakon kontraŭ ĉi tiu religio. Kaj tiun sinjorinon oni kandidatigis por la Nobelpremio pri paco! Mi vere ne komprenas.

Gerrit BERVELING
Nederlando



Kameraoj en la antikva kaj stacidoma kvartaloj de Vilniuso, ĉefurbo de Litovio, jam malaltigis krimojn je 40 %. Pli ol 1000 homoj estas arestitaj ĉefe pro trafik- kaj alkohol-deliktoj. Pro la sukceso de la unuaj kameraoj la urbo decidis instali entute 100 kameraojn. Tiel, laŭ la vilniusaj instancoj, la urbo fariĝos eĉ pli sekura ol nun.

LAST/pg



KORDOLORO

Forpasis mia karulino

Edzino estas la virino, kiu plej amas vin, komprenas vin kaj plej volonte sin ofertas pro vi en la mondo. Amu ŝin, antaŭ ol la vesperiĝo de la vivo forprenos ŝin de vi.

Rakontis la sekvan travivaĵon pri suferado, amo kaj memkonado Lin Sheng. Adaptis ĝin Xin Zhimei.

Ĉiam mi memoros la vesperon. Tiuvespere, kiam mi estis televidanta sportajn raportojn kiel kutime, mia edzino alvenis el la banĉambro kaj diris al mi: „Kial aperis nigra nevuso sur mia piedo?”

Mi estas analfabeto pri medicino kaj ne donis atenton al tio, opiniante, ke virinoj estas alarmemaj. Ni vivis en mielo kaj komforto. Kiam mi akiris bonan oficon en kompanio, ŝi forlasis la profesion kaj prizorgis ekskluzive mastrumadon. Antaŭ longe ni aĉetis komfortan apartamenton kaj aŭton kaj ekĝuis enviindan vivon. Ŝi estis farmaciistino. Ŝi sciis, ke stranga nevuso nek jukanta nek doloriga aŭguras problemon. Ŝi vizitis kuraciston kaj estis diagnozita je haŭtkancero. Ni estis ŝokitaj.

Ni vizitis ĉiujn famajn hospitalojn en Ŝanhajo, kaj la diagnozo restis tute sama. Renoma kuracisto diris al mi, ke tiu speco de haŭtkancero estas la plej danĝera, kaj mortokvanto de ĝiaj suferantoj estas 90 %. Post nelonge, ĝuste kiel antaŭdiris la kuracisto, senĉese aperis novaj nevuoj sur ŝiaj gamboj, brakoj kaj dorso. Ŝi kolapsis kaj en korpo kaj en spirito.

Fremda loko

Nia hejmo sen ŝi fariĝis glacia. Malvigleco regis en la kuirejo, malpuriĝis la bankuvo, kaj la mebloj estis kovritaj de polvo. La hela, varma kaj komforta hejmo fariĝis fremda loko por mi. Mi ne sciis uzi mikroondan fornon. Kafo, teo, tujvermiĉeloj aŭ supo, kiujn mi preparis, havis guston malsaman ol tiuj preparitaj de ŝi. Mi traserĉis tirkestojn, sed ne povis trovi la bezonatajn objektojn, kiujn ŝi povis tuj trovi por mi.

Mi komprenis, ke sukcesinta viro multe lukranta kaj multe respektata restas vana, se li ne havas hejmon mastrumatan de bona edzino. Sed, kiam ŝi enhospitaliĝis, mi petis forpermeson por flegi ŝin. Kiam pli kaj pli graviĝis ŝia malsano, iu el miaj konatoj diris al mi, ke en Kantono estas hospitalo kompetenta en kuraco de tiu-speca haŭtkancero. Kelkaj malsanuloj estis resanigitaj, sed la pago estis tre alta, kaj la resanigoj konsistigis malpli ol trionon.

Kiam mi informis mian edzinon, ŝi klare diris, ke ŝi volas vivi, kvankam ŝi estis terure turmentata de la malsano. Antaŭe mi neniam sentis tian amon,

sed en tiu momento mi trovis, ke ni estas la plej bonaj geedzoj, ke kunvivi estas la plej bela afero. Ŝi volis vivi, kaj mi volis, ke ŝi vivu. Mi petis forpermeson kaj akompanis ŝin al Kantono.

Koloso

Antaŭ ekveturo mi aĉetis multe da ĉiutagaj necesajoj en proksima memservejo laŭ ŝia listo. La plenaj sakoj estis tre pezaj. Dum multaj jaroj mi ne sciis, kiom kostas sako da rizo kaj botelo da kuiroleo, kaj ne perceptis, ke porti tiujn aĉetaĵojn hejmen estas tre laciga afero. Antaŭe mi rigardis min koloso en la hejmo. Sed kiam ŝi subite malsaniĝis, mi konsciis, ke ŝi estis la efektiva koloso en la hejmo.

En Kantono ni ĝuis la plej dolĉajn tagojn post la geedziĝo. En tiuj tri monatoj ni kunestis tage kaj nokte, dividante ĝojon kaj malĝojon. Mi jam ne povis rememori, kiom longe ni ne faris tian korverŝon. Post unumonata kuraco ŝi sentis sin ŝajne iom bone. Kelkfoje ŝi promenis, apogate de mi en la korto de la hospitalo. Ni faris rememoradojn, sentante kaj dolĉon kaj ĉagrenon. Ni neniam havis tiel longan interparoladon post la geedziĝo.

En la lastaj tri monatoj mi vidis ŝian maldikiĝon. Tia kuraco ne efikis sur ŝin, kaj fine ŝi jam ne povis preni bovlon da kaĉo. Ŝi diris al mi, ke ŝi volas iri hejmen. Kaj ni iris hejmen en malespero.

Ŝi pli kaj pli debiliĝis kaj estis atakata de terura doloro, kiun kanceruloj plej timas. Ŝi sendormis tutajn noktojn, senĉese ĝemante kaj turniĝante pro doloro. Sedativa injekto jam ne efikis sur ŝin. Mi preferus anstataŭi ŝin por elteni la suferon.

Lavmaŝino

Kiam ŝi iom reakiris la forton, ŝi testamente instruis al mi mastrumadon. Kaj nur tiam mi konsciis, ke la bagatela mastrumado estas tre laciga. Ŝi diris al mi, en kiu restoracio mi povas aĉeti la ŝatatan porkaĵon marinitan en rizvino, kaj en kiu memservejo mi povas trovi subĉemizojn, kies markojn mi preferas. Kaj tri tagojn antaŭ sia forpaso ŝi instruis al mi manipuli lavmaŝinon. Ni kune aĉetis la lavmaŝinon antaŭ kelke da jaroj, sed ĉiam estis ŝi, kiu uzis ĝin.

Kelke da tagoj antaŭ sia forpaso ŝi ripete diris al mi, ke ŝi estas feliĉa pro la edziniĝo al mi, ke la tri monatoj en Kantono estas la plej feliĉaj en ŝia vivo. Ankaŭ mi gravuros la tri monatojn en mia memoro, kvankam en la tri monatoj min preterpasis promocio, kaj mi multe perdis. Sed en komparo kun la kunestado kun ŝi, ĉio alia fariĝis bagatela. Feliĉe mi akompanis ŝin en ŝiaj lastaj tri monatoj, alie mi bedaŭrus dum mia tuta vivo.

Ŝi trankvile pasigis sian lastan tagon. Mi diris al la filo, ke la patrino iris al alia loko, kaj tie ŝi atendas nin. En la estonteco ni renkontiĝos tie, kaj ŝi ankoraŭ estos la patrino, mi la patro, kaj li la filo.

Ploro

Mi malĝojas, vidante feliĉan trimembran familion, kaj preterirante parkon, kinejon kaj memservejon, kiujn ni ofte kune vizitis. Kiam mi uzis lavmaŝinon aŭ mikroondan fornon,

kiam mi serĉis vestojn por la filo, kiam mi hejmen revenis malfrue pro pluslaboro kaj devis prepari tujvermiĉelojn, kaj kiam mi vekiĝis en noktomezo kaj trovis, ke nur mi okupis la vastan liton, mi apenaŭ povis deteni min de ploro.

Kiam ŝi vivis, mi ne trovis ion tre feliĉan, kaj opiniis, ke ŝi estas bona edzino de multaj jaroj kaj patrino de la filo. Sed kiam ŝi forpasis, mi sentis, ke la ĉielo falis. Antaŭe, kiam mi televidis viron ploreanta pro la forpaso de la edzino, mi pensis, ke tio estas nur aktorado. Sed nun mi larmis kune kun la rolo en la filmo.

Tomboŝtono

Mi memoras, ke ŝi ofte diris al la filo, ke mi estas la plej grava en la familio, ĉar mi plej lace perlaboras monon. Sed fakte ŝi estis la plej grava. Perdinte ŝin, mi kaj mia filo perdis ĝojon, la plej gravan por ni en la mondo. Mi aĉetis parcelon por ŝia tombo. Skribante „Al mia amata edzino” sur la

tomboŝtono, mi sentis korŝiran doloron. Mi ne estas esprimplena je sento, ke mi neniam diris al ŝi la vorton amo en nia amindumo. Kiam ŝi larmis, legante novelon aŭ televidante filmon pri amo, mi eĉ priridis ŝin.

Kaj nun mi povis nur skribi tiun vorton sur ŝia tomboŝtono. Mia kara edzino, se vi reviviĝus, mi dirus al vi milfoje la vorton amo, kiun ĉiuj virinoj ŝatas, ke iliaj edzoj senĉese ripetu. Sed kial mi ne diris al ŝi la vorton, kiam ŝi estis sana kaj deziris mian esprimon?

Mi volas diri al la sanaj kaj feliĉaj geedzoj, precipe la edzoj, ke vi domaĝu vian edzinon, havu laŭeble oftajn kunestojn kun ŝi kaj neniam neglektu ŝian penadon faritan por vi. Ne perceptu valoron de io nur tiam, kiam vi perdas ĝin. Edzino estas la virino, kiu plej amas vin, komprenas vin kaj plej volonte sin ofertas pro vi en la mondo. Neniu alia sento inter viro kaj virino estas komparebla kun amo de geedzoj.

LIN Sheng

HUNGARIO

Stelegoj inter libroj

El la 12 plej popularaj libroj en Hungario 7 estas verkitaj de eksterlandaj aŭtoroj. Jen la rezulto de enketo en hungaraj bibliotekoj, kunlabore kun la ŝtata televido, por trovi la plej ŝatatan libron.

La iniciato, kiu havis la titolon „La granda libro”, daŭris duonjaron. En la televido estis nomataj la plej popularaj titoloj, kaj konataj artistoj pledis por la elektitaj romanoj. La plej sukcesaj verkoj ricevis advokatojn, kiuj elokvente laŭdis la koncernajn librojn. Tiuj televidaj elsendoj anstataŭis ĉen-telefilmojn, kaj fine oni faris filmetojn pri la plej sukcesaj romanoj.

La sep eksterlandaj aŭtoroj, kiuj reprezentis en la finalo, estis Orwell (1984), Milne (*Winnie-la-Pu*), de Saint-Exupéry (*La eta princo*), Tolkien (*La mastro de l' ringoj*), Rowling (*Harry Potter kaj la ŝtono de la saĝuloj*), Bul-

gakov (*La majstro kaj Margarita*) kaj Márquez (*Cent jaroj da soleco*).

Porinfanaj romanoj

El la kvin hungaraĵoj du estas porinfanaj romanoj, el kiuj la plej konata estas *La knaboj de Paŭlo-strato* de Molnár, en kelkaj landoj deviga lerneja legaĵo. La aliaj estas *La orhomo* de Jókai, romantika romano pri komercisto ĉe Danubo; *Abigela* de Szabó, pri fraŭlino dum la dua mondmilito; kaj en la unua loko *Steloj de Eger* de Gárdonyi, patriota romano, kiu portas la leganton en la fortikaĵon Eger, kiun turkoj vane sieĝas.

Laŭ la enketo hungaroj tre ŝatas porinfanajn kaj porjunularajn verkojn. En bibliotekoj kreskas la nombro de legantoj kaj prunteprenitaj libroj.

JUHÁSZ Károly



La plimulto de tiuj libroj aperis ankaŭ en Esperanto, kaj pluraj el ili estas ankoraŭ aĉeteblaj. Vidu www.retbutiko.net.

La fino de l' mondo



Ushuaia

Ĉe la suda limo de la amerika kontinento estas insularo, kiu ĉiam ankoraŭ allogas maristojn kaj aventuremulojn. Ŝtormoj, altaj ondoj, nebuloj, ŝipdronoj estas eroj de ĝia historio. La nomon de la insularo

Gastejo ĉe la kanalo Beagle




„*Tierra del Fuego*” (Fajrolando) donis Magelano (hispane Fernando de Magallanes, portugale Fernão de Magalhães) en 1520 pro la multaj fajroj, kiujn la indiĝenoj kutime faris por sin varmigi, eĉ ene de siaj kanuoj.

Isla de los Estados

La insularo konsistas el granda insulo Isla Grande (oriente argentina, okcidente ĉilia) kaj el pli malgrandaj insuloj. Inter ili oriente de insulo Isla Grande troviĝas Isla de los Estados sur kiu laŭ Jules Verne estis la „lumturo de la fino de l' mondo”.

La lumturo fakte ne aspektis kiel turo, sed estis malalta okangula konstruaĵo sur monto en la nord-orienta insulekstreco. Ĝi estis inaŭgurita en 1884 kaj funkciis ĝis 1902, kiam oni konstruis novan lumturon sur pli taŭga loko – sur insulo Isla Observatorio, kiu situas norde.

Kun la tempo la forlasita lumturo komencis difektiĝi. Tial en 1997 oni malmuntis ĝin kaj ekspoziciis en la mara muzeo en Ushuaia, la ĉefurbo de Isla Grande. Tamen nuntempe kopio de la



Lumturo de la fino de l' mondo

lumturo denove staras sur la antaŭa loko, danke al iniciato kaj laboro de la franco André Bronner kaj subteno fare de la *Asocio de la Lumturo fine de l' Mondo* en Francio. Ties lanterno uzas sunenerĝion kaj videblas je distanco de 10 marmejloj.

Sur tiu malgastama insulo, kie preskaŭ ĉiutage pluvas kaj blovas fortaj ventoj, estas nur kvarpersona teamo armea, kiu prizorgas ĝin. Tie krom la natura bestaro estas ankaŭ ruĝaj cervoj kaj kaproj, veturigitaj tien de homoj fine de la 19a jarcento. Tiutempe tie ekzistis malliberejo, kiu poste estis translokita al Isla Grande pro la „nehomaj vivkondiĉoj por malliberuloj kaj gardistoj”.

En februaro 2004 unuafoje ekspedicio trairis piede la internan parton de la insulo 65 km longan. La marŝado, kiu postulis ankaŭ grimpadon, daŭris 20 tagojn.

Isla Grande

Sendube la plej gravaj turismaj vindindaĵoj estas sur insulo Isla Grande. Kiam la unuaj eŭropaj vojaĝantoj ĉi tien



Mapo de la Tierra del Fuego

stoj, kio estis bezonata por ilia vivteno, kaj hontiga persekuto kaj mortigo de lokaj loĝantoj. (Oni pagis unu pundon kontraŭ unu mortigita indiĝeno.) Kaj ĉio ĉi okazis malgraŭ la protektado de anglikanaj kaj katolikaj misiistoj.

La norda regiono estas altebenaĵo senarba kun grandegaj ŝafbienoj. Tie oni elterigas nafton kaj gason. Ties riveroj estas paradizo por trutkaptistoj. ▶

venis, kvar nomadaj etnoj indiĝenaj loĝis sur la insulo: *selk'nam* (aŭ *onas*) en la centro kaj nordo, *haush* en la orienta ekstremo, *yámanas* (aŭ *yaganes*) ĉe ambaŭ bordoj de la suda kanalo Beagle kaj *alikaluf* okcidente kaj sur la najbarinsuloj. Dum la unuaj du etnoj sin vivtenis per ĉasado de gvanakoj, birdoj kaj kolektado de mituloj, moluskoj kaj aliaj marbestoj, la ceteraj du fiŝkaptis kaj ĉasis ĉefe marajn lupojn, kies graso estis ties baza manĝado kaj ŝmiriĵo por protekti la korpon kontraŭ malvarmo.

Post Magelano multaj aliaj ekspedicioj atingis la insulon: hispanaj, anglaj, nederlandaj, francaj, sed la intencoj loĝigi ĝin fiaskis pro malfacilaj kondiĉoj lige kun la vetero kaj malproksimeco. Meze de la 19a jarcento ĉi tien alvenis anglikanaj misiistoj, kiuj estigis lernejojn, metiejojn, bienetojn. Thomas Bridges kaj kunuloj Lawrence kaj Lewis post la fino de sia misio decidis resti kaj bredi brutaron. Do ili fariĝis la unuaj tri bienmastroj ĉe la kanalo Beagle. Bridges ankaŭ kompilis vortaron jamanan-anglan.

La ekloĝado de blankaj homoj signifis la iom-post-ioman malaperon de indiĝenoj. Tio okazis pro la alporto de malsanoj kaj alkoholo, ĉasado de be-



Trajno de la fino de l' mondo

► Ĉe la marrando estas areo, kien venas diversaj migrantaj marbirdoj, kiuj aŭtune forflugas por nestado en la norda hemisfero. Dum la lasta duono de la 19a jarcento ĉi tien venis katolikaj misiistoj, kiuj fondis la mision de Nia Sinjorino de Kandeloj, kaj orserĉantoj.

Inter ĉi-lastaj ege elstaris la rumana inĝeniero Julius Popper. Li naskiĝis en Bukareŝto en 1857 kaj studis en Parizo. Tre juna li komencis vojaĝi tra la mondo. Popper parolis multajn lingvojn: la rumanan, jidan, francan, germanan, latinan, grekan kaj tre bone la hispanan. Estante en Brazilo, li eksciis pri la eltrovo de oro proksime al la Magelana Markolo en 1884 kaj tuj venis al Buenos-Ajreso. Ĉi tie li kontaktis aristokratojn kaj politikistojn. Popper sukcesis establi entreprenon por orserĉado. Jam en Fajrolando li estigis propran armeon por batali kontraŭ rabistoj kaj indiĝenoj.

La pliparto de la laboristoj en lia entrepreno estis kroatoj. Popper sukcesis ricevi ĝis duonkilogramo da oro tage kaj inventis orkolektilon, kiu travalis 75 tunojn da sablo tage. Sed li ne nur havis armeon kaj surhavis pompan uniformon hungareskan por paradoj, li eldonis ankaŭ poŝtmarkojn kaj stampis monerojn. En 1893, dum Julius Popper estis en Buenos-Ajreso por organizi ekspedicion al Antarkto, li subite mortis. Por iuj li estis progresema homo, kiu esploris kaj faris mapojn de la regiono, projektis fervojojn kaj certigis la sekurecon. Por aliaj li estis masakranto.

En la centra parto de la granda insulo komenciĝas la arbaroj, kie oni ellaboras lignon. Tie estas la plej granda lago, 100 km longa kaj 6 km larĝa,

nomata Fagnano, antaŭe natura limo inter la etnoj *selk'nam* kaj *yámanas*.

En la suda regiono estas montoj, valoj, glaciejoj, lagoj, arbaroj, golfetoj kaj fjordoj. Ĉe la kanalo Beagle troviĝas la ĉefurbo Ushuaia („golfeto okcidente” en la jamana lingvo). Komence tie estis malliberejo por danĝeraj krimuloj (kaj ankaŭ politikaj kontraŭuloj), kaj ĝia celo dekomence estis loĝigi tiun malproksiman regionon. Aliflanke, pro la kruda klimato ebloj eskapi de tie ne ekzistis. La malliberejo funkciis de 1896 ĝis 1947, kaj ĝia granda influo ĉiam ankoraŭ sentiĝas.

La karcerfunkciis kiel ĉefdunganto kaj certigis la bazajn bezonojn de la malgranda vilaĝo: elektron, telegrafon, riparejon, flegejon, panejon. Tie funkciis ankaŭ la unua presejo sur la insulo. La malliberuloj havis muzikan orkestron kaj futbalan teamon. Ili laboris ĉe la konstruado de lernejoj, kloakaj kanaloj kaj stratoj, sed ne estis bone pritraktataj, kaj kun la tempo la situacio malboniĝis. Ĝis la 30aj jaroj de la pasinta jarcento la malliberuloj kutime estis batataj kaj torturataj.

Ekde 1909 funkciis trajneto ĝis la proksima arbaro, kie nuntempe troviĝas la nacia parko de Fajrolando. Per ĝi la bonkonduktaj malliberuloj veturis kolekti brullignon. Post la fermo de karcerulo la urbeto malprogresis ĝis 1980, kiam oni starigis favorajn impostleĝojn por la regiono kaj evoluigis turismon.

Hodiaŭ en la domo de la karcerulo troviĝas mara muzeo, artgalerio, biblioteko, salono kaj restoracio, kie la kelneroj uzas la striitan uniformon de malliberuloj. La trajneto nun estas turisma kaj estas nomata „Trajno de la Fino de l' Mondo”. Tirata de vaporlo-

komotivo, ĝi malrapide traveturas 14 km da arbaroj, montetoj, akvofaloj kaj torfejoj de la nacia parko. Ĝi ampleksas 63 000 hektarojn, el kiuj nur 2000 eblas viziti. En ĝi kunestas mar- kaj mont-partoj kun ties flaŭro kaj faŭno. Bedaŭrinde en la 50aj jaroj de la pasinta jarcento oni alveturigis el Kanado 26 kastorparojn, kiuj, sen naturaj malamikoj, ege multiĝis kaj nun estas plago por la insulo.

Kanalo Beagle

Turistoj povas entrepreni diversajn ŝipekskursojn tra la kanalo Beagle kaj krome vojaĝi el Ushuaia al Antarkto. La nomo de la kanalo devenas de la brigo, per kiu la brita admiralo Robert FitzRoy vojaĝis al tiu ĉi parto de la mondo. En 1828 li malkovris la kanalon kaj en 1830 venigis al Anglio tri junajn jamanojn, por ke ili tie estu edukataj kaj poste transdonu siajn konojn al la ceteraj indiĝenoj de Fajrolando.

En 1831 FitzRoy komencis novan vojaĝon al Fajrolando kaj kun li veturis Charles Darwin kaj la junaj indiĝenoj. Bedaŭrinde tiu eksperimento fiaskis: reveninte hejmen la junuloj tuj reakiris siajn antaŭajn kutimojn. Estas teatra spektaklo, kiu prezentas tiun okazaĵon kaj per dekoraj imitas la brigon Beagle.

Tre proksime al la urbo estas 12 sportejoj kun plej modernaj instalaĵoj por praktikado de ĉiuj vintraj sportspecoj kaj ludoj. Eble ŝajnas strange, sed la plej favora sezono por subakviĝi en la kanalo Beagle estas la vintro. La kialo estas, ke vintre la akvo estas pli klara kaj travidebla, dum en somero la sunlumo kreskigas la planktonon, kiu malklarigas la akvon. En la flaŭro de marprofundo ege elstaras gigantaj algoj.

La 20an de junio ĉiujare okazas la festo de la plej longa nokto, kiu konsistas el muzika prezentado, parado sur skioj, renkontiĝo de neĝskulptistoj, vetkurado de hundtirataj sledoj kaj aŭtokonkurso, en kiu partoprenas la plej bonaj profesiaj ŝoforoj de la lando.

Resume: ĉe la fino de l' mondo la vizitantoj ĝuas naturbelaĵojn, aventurojn, distrojn kaj ekkonas historion kaj fikcion.

Marta Solís

TTT-ejoj:

www.ushuaia.com.ar (hispana)

www.patagonia-travel.com (hispana-angla)

www.tierradelfuego.org.ar (hispana-angla)

www.hebreos.net (hispana: pri Popper)

www.trendelfindelmundo.com.ar (hispana-angla)

www.turismo.gov.ar (hispana)

www.argentour.com/pntierradelfuego.htm (hispana)

Kiam eŭro venos al Litovio?

En Litovio ofte aŭdeblas, ke la jaro 2006 estas la lasta, kiam en la lando cirkulas la nacia valuto lido. Ekde la 1a de januaro 2007 ĝin devus anstataŭi la eŭropa valuto eŭro. Tamen ĉu vere okazos tiel, kiel asertas la aŭtoritatoj de la lando, ne estas centprocente klare.

Litova eŭro jam ekzistas

En Kaunas, la dua litova urbo, Litova Banko aranĝis ekspozicion pri la estiĝo de la eŭro-moneroj. En ĝi ankaŭ estis prezentita la landa flanko de la estonta litova eŭro-monero. Ĝi estas rezulto de konkurso, kiun Litova Banko iniciatis en la jaro 2004. Ĝin partoprenis 14 desegnistoj, kiuj prezentis 54 gipsajn modelojn. Kiel plej bona estis elektita tiu de la skulptisto Antanas Žukauskas.

Sur la litovaj eŭro-moneroj estos la ŝtata blazono *Vytis* kaj simboloj necesaj por ĉiuj eŭro-moneroj – 12 steletoj kaj la dato de stampado. Reindijus Šarkinas, la prezidanto de Litova Banko, diris, ke Litovio esperas akiri permeson stampi monerojn sufiĉe baldaŭ.

Litovio progresas

La Eŭropa Komisiono, kontrolinta la situacion en la landoj, kiuj celas enkonduki eŭron ekde la jaro 2007 aŭ 2009, konstatis, ke Litovio, Estonio, Slovakio kaj Slovenio progresis, sed ke Estonio kaj Litovio, kiuj intencas ekcirkuligi la eŭropan valuton ekde 2007, devos plivigligi la necesajn preparlaborojn kaj kuraĝigi la popolon, obseditan de timo de prezokresko.

La planoj antaŭvidas periodon, dum kiu cirkulos la du valutoj, rimedojn pri protektado de konsumantoj, konfirmon de la desegno de la nacia eŭro-flanko kaj proceduron por la provizado de necesa kvanto da eŭro-biletoj kaj -moneroj. Litovio i.a. devus findecidiĝi pri laborhoraro de la bankoj

dum la ekfunkciiga periodo, zorgi pri transportado kaj gardado de biletoj kaj moneroj de la nova kaj de la forigota landa valutoj kaj prilabori informadon pri tarifoj kaj salajroj de ŝtataj dungitoj en ambaŭ valutoj.

Plano prilaborita

Bankprezidanto Šarkinas informis, ke la laboroj pri la valutŝanĝo en Litovio kostos preskaŭ 30 milionojn da eŭroj. Tiujn elspezojn kovros la lando mem, Eŭropa Centra Banko kaj Eŭropa Komisiono. Li substrekis, ke la preterlaso ekhavi eŭron en 2007 povus kaŭzi seriozajn ekonomiajn malavantaĝojn.

Organizaĵoj pri protektado de rajtoj de konsumantoj ekdubis, ĉu Litovio sukcesos kontraŭstari la kreskon de prezoj dum la ekfunkciigo de eŭro. Dume la ministrejo pri financoj proponis al komercistoj subskribi kvazaŭ honorkodon, per kiu entreprenoj sin devigus ĉiujn prezojn ŝanĝi laŭ fiksita lida-eŭra kurzo. Krome komercistoj sin devigus dum du monatoj antaŭ kaj post la enkonduko de eŭro indiki prezojn en ambaŭ valutoj. Tio estu bona memreklama rime-



Litovio jam prezentis siajn proprajn eŭro-monerojn.

do kaj morala protekto kontraŭ intenca prezaltigo.

Valdas Sutkus, estro de la Asocio de Komercaj Entreprenejoj, certigis, dirante: „Neniu eĉ ideon havas dum enkonduko de la eŭro profitcele ▶



La 30an de aprilo 2004 litovoj kuncelebris la aliĝon de Litovio al Eŭropa Unio antaŭ la katedralo de Vilniuso.

► altigi la prezojn. Nek tia deziro, nek bezono ekzistas. Krome tio estas afero malfacile imagebla pro granda konkurencado.” Algirdas Brazauskas, la ĉefministro de Litovio, trankviligas, asertante, ke ne estas motivo por ŝanĝi la eŭro-lido-kurzon, fiksitan la 2an de februaro 2002. Ekde tiu dato unu eŭro valoras 3,4528 litovajn lidojn.

Enketo montris, ke 87 % de la popolo opinias, ke la parlamento devus alpreni leĝon, malpermesantan altigon de prezoj pro funkciigo de eŭro. Krome 63 % da enketitoj kredas, ke kun apero de eŭro ilia financa situacio malboniĝos.

Inflacio minacanta

La registaron, kiu faras ĉion por ekhavi eŭron ekde 2007, precipe maltrankviligas la fakto, ke la jara infla-

cia indico en la lando povas superi la maksimumon, permesatan laŭ la Traktato de Mastroiĥto. Tiu traktato preskribas, ke en lando, kiu celas al enkonduko de eŭro, jara inflacio ne povas superi je pli ol 1,5 procentaj punktoj la averaĝan indicon de la tri EU-landoj kun la plej malalta inflacio.

En septembro 2005 la jara inflacio en Litovio estis 2,6 % kaj superis la mastriĥtan inflacian indicon je nur 0,1 procenta punkto. Dum la periodo de majo ĝis septembro 2005 la inflacio en Litovio atingis 2,1 %, en Slovenio 2,2 % kaj en Estonio 3,8 %.

Popolo dubas

Ju pli proksimas la eŭro, des pli malfavora iĝas la sinteno de la popolo. Enketado en novembro 2005 montris, ke 51 % de la enketitoj opinias, ke la

lando devus ne enkonduki eŭron. Nur triono (34 %) opinias, ke eŭro estas necesa. Enketado dum la antaŭa jaro montris pli favoran rezulton: tiam por eŭro jesis 47,7 % kaj neis 36,3 % de la enketitoj.

Litova Banko, registaro kaj parlamento opinias, ke nova referendumo pri eŭro ne estas necesa, ĉar, laŭ ili, la referendumo de 2003 pri aniĝo al Eŭropa Unio signifis ankaŭ akcepton de komuna valuto. Tamen novaj iniciatoj por organizi eŭro-referendumon en Litovio aperas. Opozicia Litova Nacia Unio deklaris, ke ĝi kolektos 300 000 jes-subskribojn necesajn, por ke referendumo okazu. La parlamento jam dufoje rifuzis proponon de opozicia liberal-demokrata frakcio pri aranĝo de referendumo.

Laimius STRAŽNICKAS

SERBIO-MONTENEGRO

Novi Beograd disvolviĝas

Unu el la komunumoj de la ĉefurbo Beogrado estas Novi Beograd (Nova Beogrado). Ŝajnas, ke ĝiaj estroj sufiĉe bone organiziĝis kaj sukcesas daŭre disvolvadi sian komunumon. Uzante la monon de eksterlandaj investantoj, ili kreas ankaŭ novajn laborlokojn.



Mercator-centro: la unua granda investo.

La investoj ne venis per si mem. La komunumestroj sukcesis altiri ilin per kvalitaj projektoj kaj per investado en la infrastrukturo, precipe

ordigado de la komunuma teritorio. Ĉio komenciĝis, kiam la slovena entrepreno *Mercator* (www.mercator.si) aĉetis de la komunumo, je prezo de

ĉirkaŭ ok milionoj da eŭroj, unuhektaran terpecon por konstrui komercan centron. Tiu aĉeto estis la unua eksterlanda investo en Beogrado post la dua mondmilito.

Anstataŭ por salajroj, kiel ofte estis la praktiko, la mono estis uzita por ordigi la terenon de la komunumo apud la planita komerca centro. Estis konstruitaj kvar kilometroj da bulvaroj ĉirkaŭ la centro, kloakaro kaj akvoreteto. Ĉiuj tiuj investoj kaŭzis, ke ĝuste en tiu urboparto oni konstruis novajn konstruaĵojn por aliaj, ĉefe eksterlandaj, grandaj entreprenoj kaj komercaj centroj. Krome, oni ĵus faris akvo-parkon sur areo de kvin hektaroj apud la rivero Sava.

Ankaŭ la loĝej-konstruado progresas. Dum la jaro 2003 oni konstruis nur 359 loĝejojn, sed en 2004 estis konstruitaj 1943 kaj en 2005 jam 3000 novaj loĝejoj.

Zoran ĈIRIĆ

Novaj versioj iĝis pli bonaj, sed restas mankoj

En antaŭaj numeroj de MONATO (2005/7-8, 10 kaj 11) aperis spertoj pri senpage haveblaj komputilaj programoj. Intertempe de kelkaj aperis nova versio, tiel ke indas denove raporti.

OpenOffice: preskaŭ kompleta

OpenOffice certe estas la plej bone ellaborita senpage solvo por anstataŭi la mikrosoftajn oficejajn programojn. Mi uzis ĝian version 1.1 por kelkaj taskoj kaj decidis transiri al la versio 2.0. La instalo ne kaŭzas notindajn problemojn por persono, kiu komprenas la anglan. Oni elŝutu la instalprogramon, konservu ĝin sur la komputila disko, lanĉu ĝin kaj sekvu la instrukciojn. Nun nur kelkaj alilingvaj 2.0-versioj estas pretaj; por la plejparto – interalie Esperanto – la traduklaboro progresas.

Mi notis diversajn plibonigojn. Eĉ ege malnovaj *WordPerfect*-dosieroj senprobleme legeblas (kvankam ne perfekte, se la enpaĝigo estas komplika – sed la sama rimarko validas por la sinsekvaj versioj de mikrosoftaj programoj). Ĝi pli bone ol antaŭe montras prezentadojn faritajn per *PowerPoint*. Mi plej scivolis pri la nova datenbanka parto de *OpenOffice*. La plej bezonata tasko – malfermi *Access*-dosieron – ankoraŭ bezonas iom da manipulado, sed ne plu helpprogramojn: interesa progreso. Trafoliumante la plurcentpaĝan gvidlibron de la programo, mi vidis instrukciojn, kiuj rememorigis min pri iam sekvitaj *Access*-kursoj. Tio ŝajnis, ke per *OpenOffice* eblas fari same komplikajn datenbankojn kiel per *Access*. Tamen, simpla interŝanĝo de dosieroj inter ambaŭ programoj plu ne eblas.

Netscape: elreviĝo

De *Netscape* mi ŝatis la kombinon de poŝtilo kaj foliumilo en unu programo. Ĉar en la informpaĝoj nenio estis skribita pri tio, mi supozis, ke ankaŭ

la nova versio 8.0 enhavas ambaŭ kapablojn. Nur kiam mi intencis efektive transigi miajn poŝto-dosierojn al la nova versio, mi konstatis, ke ne plu estas poŝtilo. Kion fari? Dum pluraj monatoj mi daŭrigis la uzon da la malnova versio 7.0 (eble la plej saĝa solvo), sed restis la deziro „modernigi” mian pro-

gramaron. Finfine mi decidis adiaŭi *Netscape* (kies version 8.0 mi cetere opiniis troŝarĝita) kaj ekuzi *Firefox* (1.5) kiel foliumilon kaj *Thunderbird* (1.0.7) kiel poŝtilon. Ĉiuj estas anoj de la sama *Mozilla*-familio kaj la uzado similas.

La instalo de ambaŭ programoj ŝajne okazis perfekte. La *Thunderbird*-instalprogramo promesis aŭtomate transpreni ĉiujn informojn de *Netscape* kaj efektive okupiĝis dum deko da minutoj pri importado de mia poŝtarĥivo. Bedaŭrinde, ĉe la unua lanĉo de la programo evidentiĝis, ke ĉiuj poŝtkestoj estis malplenaj kaj ▶



Regule la eldonejo de *Monato* ricevas demandojn pri la estonteco de la programo Ĉapelilo. La firmao, kiu produktis Ĉapelilon, ne plu ekzistas, kaj sekve ĝia liverado finiĝis. Ni rekomendas malfermi viajn malnovajn dokumentojn per Ĉapelilo (elektu la unuan menuon „Dosiero” kaj tie elektu „Malfermu ...”). Poste vi sekurigu ilin kiel RTF-dokumenton (elektu la unuan menuon „Dosiero” kaj tie elektu „Sekurigu kiel ...”; kiel dosierspecon elektu „Rich Text Format (.RTF)”. Tiujn ĉi RTF-dosierojn vi povas malfermi per aliaj programoj, ekzemple per la senpage *OpenOffice*-programo (eo.openoffice.org). *OpenOffice* cetere havas la grandan avantaĝon, ke ĝi disponas pri literumilo, kiu povas elsarki tajperarojn, ankaŭ en Esperanto.



Valora pripensindaĵaro

teologion de la romkatolika eklezio; kaj „ateisto” signifas personon, kiu malakceptas la romkatolikan teologion. Pro tio franclingvaj verkistoj, nomantaj sin „ateistoj”, ofte estas tre teologiplenaj, laŭ personoj el aliaj kulturoj.

Tiu specifa ekzemplo ne aperas en la ĉi-koncerna simpozio. Tamen, ja emfazata tre ofte en la artikoloj estas la vidpunkto, ke uzo de specifa lingvo neeviteble kuntrenas la tutan vidpunktaron de la indiĝenaj parolantoj de tiu lingvo. Plej ofte, kaj plej krude, estas asertate, ke kiam la angla estas uzata de neindiĝena parolanto de la angla, ĝi esprimas la tutan usonan kulturon, kaj mankas la origina kulturo de la parolanto. Eĉ ke dulingvulo pensas unumaniere en unu el siaj lingvoj kaj alie en la alia.

Ĉu efektive estas tiel? Kaj, se jes, kial Esperanto ne spertus la saman fenomenon? Oni diras, ke Esperanto estas interkultura, aŭ egale neindiĝena por ĉiu. Aliaj komentas, tamen, ke tio estas nur parte vera: Esperanto estas plene produkto de la hindeŭropa lingvogrupo, kaj azianoj trovas ĝin tre eŭropeca. Kaj se Esperanto fariĝos ĝenerale la dua lingvo de ĉiuj homoj, ĉu ja sekvos, ke la „mer-

kataj potencoj” iel diferencos per sia konceptaro de la nunaj? Ĉu la „koka-kola-kulturo” ekŝanĝiĝos, se la usonaj *kultur-imperiistoj* esprimos sin per Esperanto anstataŭ per la angla? La esperantistaro nuntempe estas sufiĉe malgranda, por povi (plejparte) toleri kulturajn diferencojn de la kunkomunikantoj. Kaj, kiel kelkaj aŭtoroj emfazas, toleras ambiguecon en la parolaĵoj de aliaj personoj kaj en siaj propraj diraĵoj (kiam ili ne konas la precizajn vortojn por esprimi certan koncepton).

Tute alia afero estas la facileco aŭ malfacileco de la angla lingvo aŭ de Esperanto. Estas rimarkite, ke multaj esprimoj, bone konataj en Esperanto, efektive estas komunaj al la plejparto de la eŭroplingvanoj, sed ne nepre al la ekstereŭroplingvanoj. Estas dezirindege, ke iu(j) aziano(j), prefere azianoj, kiuj ne konas alian eŭropan lingvon ol Esperanton, kompilu liston de tiaj esprimoj.

Eble pli grave estas, ke nek la anglan, nek Esperanton kapablas plene prononci multaj personoj en Eŭropo, nek en Azio (kaj sendube ankaŭ en Afriko; kaj, kompreneble, Latin-Ameriko). Ĝis kiom eblas toleri prononcodiferencojn rilate al la literoj „l” kaj „r”? Kiom

Kio estas kulturo, kaj kiel ĝi rilatas al lingvo? La respondoj al tiuj demandoj estas kaj kompleksaj kaj tre variaj. Laŭ iuj personoj kulturo kaj lingvo estas tiom kunligitaj, ke tute ne eblas apartigi ilin. Laŭ aliaj personoj la ligo inter ili estas tre malforta, eĉ mankanta. Laŭ iuj personoj la kulturo determinas la lingvon, kaj inverse: la lingvo determinas la kulturon. Laŭ aliaj personoj la kulturo manifestiĝas nur per la kromsignifoj de specifaj vortoj; per historiaj aŭ religiaj kunteksto, specifaj al unu grupo. Ofte estas dirite, ke por franco la vorto „dio” signifas la

► ke la arĥivo estis netrovebla. Aldona komplikajo estis, ke la novaj poŝtaĵoj ankoraŭ venis en la poŝtkeston de la antaŭe uzata programo. Per serĉado tra helpforumoj kaj instalado de helpprogrameto *Mbox*, entute pluraj horoj da laboro, la plej gravaj problemoj estis solvitaj, sed restas la iom malagrabla konstato, ke de mia poŝtarĥivo nun troviĝas minimume tri kopioj en la komputilo kaj ke verŝajne neniu versio estas tute kompleta.

Jen la problemoj de liberaj programoj: ili ne estas same fidindaj kiel la tradiciaj programoj (precipe se temas pri novaj versioj), kaj tuja helpo ne abundas. Pri la unua problemoj mi mem kulpas: mi bone scias, ke novaj

versioj de programoj havas mankojn (kvankam entuziasmaj reklamoj kaj recenzoj silentas pri tio), sed mi konscie decidis instali ilin. La dua problemoj estas esence propra al produktoj fariĝitaj de volontuloj. *OpenOffice* estas escepto kaj havas abundan instrukciarion (kvankam por la plej nova versio nur en la angla lingvo). La aliaj havas nur limigitajn helpdosierojn, kiuj ne donas respondon al ĉiuj demandoj. Ekzistas forumoj, sed ili estas precipe anglalingvaj (kaj foje malfacilas priskribi problemon eĉ en la gepatra lingvo) kaj necesas iom da tempo por ek trovi kaj ekkoni ilin. Por ambaŭ programoj restas problemetoj, kiujn mi ne sukcesis solvi.

Google Desktop Search: eta manko

La programon por trovi informojn en la propra komputilo mi nur malofte uzas, sed ĝi tamen de tempo al tempo tre utilis. Mi aŭdis de alia uzanto, ke ĝi foje donas nevalidajn respondojn, se la koncerna dosiero post indeksado estis forigita de la komputila disko. Aŭtomata ĝisdatigo de la indekso ne eblas. Se tio tro ĝenas, la sola solvo estas malinstali kaj reinstali la programon kaj fari novan indekson. Tamen, plejparto de la uzantoj ne sentos tiun bezonon, ĉar komputilaj diskoj iĝis tiom grandaj, ke malofte necesas forviŝi ion.

Roland ROTSAERT

da vortoj distingiĝas nur per sia utiligo de „l” kaj ne „r”, aŭ inverse, en la sama silaba pozicio? Kiuj estas tiuj vortoj? La literoj „b” kaj „v” kaj „p” kaj „f” prezentas similan problemon, unu aŭ pli el tiuj fonemoj mankas en diversaj ĉeflingvoj de la mondo.

Ankaŭ la esperantaj vokaloj prezentas problemojn jam inter eŭropanoj. Por „indiĝenaj” anglalingvanoj, la skribita vokalo „a” en la angla vorto „*tomato*” estas aŭ la esperantlingva „a” aŭ la esperantlingva „ej”; temas pri du alofonoj de unusola fonemo. Sekve, oni kutimas al la du prononcoj de la vorto „*tomato*”: *tomato*/tomejto. Plian problemon prezentas la triopigo de la alofonoj, ĉar por „indiĝenaj” anglalingvanoj ankaŭ la vokalo, aŭdata de la plej multaj eŭropanoj kiel „e”, estas alofono de „a” kaj „ej”. Tamen „indiĝenaj” anglalingvanoj zorge distingas inter „*sat*” (sidis) kaj „*set*” (metis), kiuj, ŝajne, por la plej multaj eŭropanoj ambaŭ aŭdiĝas same. Tio ne estas problemo nur de la angla lingvo, ĉar „indiĝenaj” anglalingvanoj, parolante Esperanton, en sia prononcado ankaŭ interkonfuzas tiujn vokalojn/fonemojn/alofonojn. La indulgemo de esperantistoj rilate al prononcodiferencoj tre rapide malaperus, se ĝi kaŭzus miskomprenojn, kio neeviteble okazus, se ĉiuj homoj uzus Esperanton kiel duan lingvon, *interkulturan*. La prononcoproblemoj de Esperanto por diversaj popoloj estas menciitaj plurfoje en la artikoloj en la simpozio, sed neniu solvo por tiu problemo estas diskutita.

Tute alia aspekto de la kulturo/lingvo-diskuto estas la problemoj de tradukado/interpretado. Tradukado rilatas al la perskriba transdono en unu lingvo (la *cellingvo*) de teksto, skribita en alia lingvo (la *fontolingvo*). Interpretado estas la parola transdono de parolata diraĵaro, esprimita en unu lingvo, per alia lingvo. En la praktiko la du artoj estas tre apartaj. La tradukanto kutime povas labori nerapide, povas konsulti leksikonon, aliajn personojn, eĉ demandi al la verkinto pri ties intencitaj aludoj aŭ esprimsignifoj. Interpretanto, en la praktiko, devas tuj rediri per unu lingvo tion, kio estis ĵus dirita per alia lingvo. La interpretanto devas tuj re-

doni parole, ne povas konsulti iun ajn, devas aŭskulti novan parolaĵon en la fontolingvo, samtempe dirante la ĵusan parolaĵon en la cellingvo. Komuna al ambaŭ, kaj tradukantoj kaj interpretantoj, estas la bezono kompreni eĉ tre teknikajn konceptojn kaj terminojn, diratajn de la fontolingvulo, kaj ilin esprimi egale teknike kaj termine, ĝuste, en la cellingvo. En la praktiko tio ne estas farebla. La scio kaj kapablo de ĉiu homo estas limigitaj, neniu homo mastras la tutajn teknologiojn kaj terminaron eĉ en unu lingvo, neniel en du aŭ pli da ili. Tiu problemo ekzistas; negrave, ĉu temas pri etna lingvo, ĉu pri Esperanto.

Kelkaj aŭtoroj en la simpozio pritraktas la problemon de la uzado de pluraj lingvoj en unu lando. Aliaj pritraktas iom esoterajn teoriojn lingvisti-

kajn. Kelkaj brile pritraktas sian temon, klare kaj klare; aliaj tro kurte (neniuj tro longe!) por fari pli ol skemeton.

Entute, ĉi tiu estas libro, kiu vekas la bezonon trovi solvojn, pli ol prezentas solvojn. Do ĝi estas ne por la superentuziasma propagandisto de Esperanto, sed por la pensemulo. Valora pripensindaĵaro.

Donald BROADRIBB

Symposium on Communication Across Cultural Boundaries/Simpozio pri interkultura komunikado, 2003-08-02-03. Christer Kiselman (red.) Eld. Kava-Pech, Dobřichovice, 2005. 157 paĝoj gluitaj. ISBN 80-85853-82-5.

Prezo ĉe FEL: 14,30 eŭroj + afranko.

Taglibroj de murdita infano

La 20an de januaro 2005 la Ĉeĥa Poŝto eldonis memorigan poŝtmarkon. Sur la poŝtmarko montriĝas desegnaĵo de la luno, en kies ĉielo videblas la malproksima tero; kaj apud la desegnaĵo estas foto de infano, Petr Ginz (1928-1944). La poŝtmarko honoras la unuan publikigon de du taglibroj de tiu infano, la kreinto de la desegnaĵo.

Inter la 19a de septembro 1941 kaj la 8a de aŭgusto 1942 la 14-jara Petr skribis en paperaj kajeroj, kiujn li mem kunmetis el malnovaj paperpecoj kaj mem bindis, du sinsekvajn taglibrojn.

Tiuj du taglibretoj ne estis la solaj, kiujn li skribis; ankaŭ diversaj aliaj folioj, sur kiuj li skribis, kaj relative granda nombro da desegnaĵoj kaj akvarelaj pentraĵoj ekzistas, zorge konservitaj de la patro de la infano. Ili nun troviĝas en la muzeo *Jad Vašem* en Jerusalemo.

En januaro 2003 la israela astronauto Ilan Ramon petis la muzeon *Jad Vašem* doni al li ion, kion li povos kunpreni en la kosmoŝipo *Columbia*,



honore al la viktimoj de la holokaŭsto. La muzeo donis al li por tiu celo kopion de la linogravuraĵo, kiu aperas nun sur la poŝtmarko.

La kosmoŝipo *Columbia* pereis katastrofe la 1an de februaro 2003. La ►



La desegnaĵo de Petr Ginz

► infano, kiu desegnis la linogravuraĵon, Petr Ginz, egale katastrofe pereis, en gaskamero en Aŭŝvico en septembro 1944.

Sesdek jarojn post la morto de sia frato, la fratino de Petr sukcesis eldoni la du taglibretojn en volumo, kiu ankaŭ detale informas pri Petr, inkluzivas grandan nombron da liaj artverkoj, kaj kelkajn fotojn, kaj komentojn por ekspliki pri la teruraj eventoj, tre koncize menciitaj en la taglibroj.

La unuaj linioj de la unua taglibro tekstas:

„La vetero estas nebula.

Oni enkondukis emblemon por la judoj, kiu estas proksimume jena: [li skizas judan stelon kun la germana vorto 'Jude' en la mezo].

Kiam mi iris al la lernejo, mi kalkulis sume 69 'ŝerifojn', la patrino finkalkulis poste pli ol cent.”

La vorto „ŝerifojn”, kompreneble, ŝerce kvazaŭkomparas la judojn kun iliaj flavaj steloj kaj la ŝerifojn en la usonaj filmoj el la „sovaĝa okcidento”, kiuj surportis orkoloran emblemon.

lom post iom en la taglibroj ni legas simplajn menciojn pri konstante novaj malpermesoj, faritaj de la nazia reĝimo, kontraŭ la judoj; kaj pri brutalaj agoj kontraŭ judoj:

„4.X.1941 (*Sabato*) ... Estis planitaj konkursoj, sed ili ne efektiviĝis, ĉar estis tro malforta vento kaj iu knabo (14-15-jaraĝa) ŝtonĵetis al ni.”

„1.I.1942 (*Ĵaŭdo*) ... Tabakkupononjn ne ricevas arestitoj, frenezuloj kaj la judoj. La judoj ne rajtas veturi en la antaŭa tramvagono, en aŭtobuso, trolebuso; sur la kajo ili ne rajtas promeni ktp. ktp.”

„26.I.1942 (*Lundo*) ... Hodiaŭ de la tria horo posttagmeze la judoj ne rajtas veturi en la tramoj”

Diversloke ni legas, inter la ordinaraĵoj ĉiutagaĵoj, pri arbitra mortpafado de judoj fare de la naziaj okupaciantoj. Sed multe pli timige, preskaŭ ĉiusemajne ni legas pri konatoj de Petr kaj pri najbaraj familioj judaj, devigitaj paki siajn valizojn kaj iri al la „forirejo”, por transporto ... kien? Kelkfoje al Pollando, pliofte al Terezín, kie ili devis loĝi, atendante transportadon al Pollando.

Kio pleje larmigas la leganton, estas, ke ĉi tiuj (kaj multaj aliaj similaj) incidentoj estis notitaj, senaverte, inter aliaj *ĉiutagaĵoj*: lecionoj en la lernejo, kuracistaj konsultoj, pretigo de manĝoj, ludoj kaj simile. Jes, ĉiutagaĵoj. Por infano 14-jara, la morto aŭ forsendiĝo por esti mortigita fariĝis ĉiutagaĵo, unu evento inter ĉiuj aliaj. Nenia emociiĝo estis indikita en la taglibroj. Temis pri simplaj faktoj de la ĉiutaga ekzisto. Rutinaĵoj.

Petr estis neelstara infano. Eble, plenkreskinte, li fariĝus talenta artisto profesia – la pentraĵoj, reproduktitaj

en la 21 bildopaĝoj ĉe la fino de la libro, indikas, nu, ne genian talenton, sed artkapablon pli grandan, ol tiu de tipa dekkvarjarulo. Lia fratino, la pretinginto de la libro, iom troige admiras lian verk talenton, kaj ŝi inkluzivas en la libro specimenojn el iuj provverkoj liaj. Verdire, oni povas dubi pri ilia literatura valoro. Ne anticipu trovi ion grandiozan en ĉi tiu volumo. Nur la simplajn notojn pri vivspertoj, skribitajn de senkulpa infano, kiun mortigis profesiaj de la ŝtato dungitaj murdistoj, por plenumi la ordonojn de freneza diktatoro kaj lia samideanaro.

Interesas, ke kaj Petr kaj lia tuta familio estis tre kompetentaj esperantistoj. De tio nur unu spuro montriĝas en la libro mem, la reprodukto de du paĝoj el Esperanto-ĉeĥa vortaro, kiun li verkis dum sia dujara atendo en Terezín antaŭ sia transportiĝo al gasmortigo en Aŭŝvico.

lom bedaŭrigas, ke Petr verkis siajn taglibrojn ĉeĥe kaj ne esperante, ĉar la traduko estas plena de ĉeĥismoj. Tre ofte la vorton „de” anstataŭas la vorto „al” (supozeble pro la kazstrukturo de la ĉeĥa lingvo, ĉar precize same estas en la traduko de la romano *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito*, eldonita en 2004 de la sama eldonejo Kava-Peĥ). „Laŭdire” uziĝas multtekfoje, evidente ĉeĥismo, uzata, kiam ni atendus la uzon de finitiva verbo. Sed ĝenerale, kvankam ne tre kontentiga, la traduko adekvate komprenigas sin.

La libro estas bele prezentita, estetike. La preskaŭglacea papero estas plezuriga. La kompostado estas bona, kaj tajperaroj tre maloftas. Do aspekte rekomendinda. Rilate al sia enhavo, rekomendinda ne pro literaturaj kialoj, sed pro sia historia memorigo pri la sorto de senkulpuloj, pro la agado de frenezaj registoj, kiuj majstris la arton de ŝtatterismo.

Donald BROADRIBB

Chava Pressburger: *Taglibro de mia frato*. Tradukis el la ĉeĥa Vlastimil Novobilský kaj Věra Novobilská. Eld. Kava-Peĥ, Dobřichovice, 2005. 136+21 paĝoj, kudritaj. ISBN 80-85853-79-5.

Prezo ĉe FEL: 22,86 eŭroj + afranko.

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,



Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tif. + 32 3 234 34 00; tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@fel.esperanto.be;
skajpe: fel-monato
aŭ per www.retbutiko.net.



En fremda lando

Wen Xin malfermis la pordon de sia nova loĝejeto en studenta hejmo en Esbo. Ĉu vi ne scias, kie situas tiu moderna urbo? – En Finnlando, apud Helsinko. Nur dek tagojn Xin loĝos tie kaj poste transloĝiĝos en alian studenthejmon, pli proksiman al sia nova laborejo, kie ŝi restos almenaŭ du monatojn.

Tre moviĝema Xin devis esti dum la du pasintaj jaroj. Ŝi ĵus venis de Kardifo, kie ŝi studis dum duonjaro por plibonigi sian anglan vortostokon kaj fluecon. Nun ŝi sentis sin laca, ege laca. La loĝejo odoris fremde. Certe pro la fremda kuirarto, Xin opiniis. En ŝia hejmlando loĝejoj odoras malsame. Ankaŭ en Kardifo malsamaodoro. Ĉu pro la spicoj? Aŭ ĉu la homoj mem malsame odoras en diversaj landoj kaj en diversaj hejmoj? Ĉu niaj manĝaĵoj igas nin odori, aŭ ĉu la detergantoj? Xin demandis sin. Aŭ ambaŭ? Aŭ la sapo kaj parfumoj? La vegetaĵoj, la tero mem?

Kien meti la pezan valizon? Kien la dorsosakon? Estis krepuske en la antaŭĉambro, sed Xin komencis vidi, ke ĝi ne tre plaĉas al ŝi. Ne nur pro laodoro. Xin serĉis la ŝaltilon de iu lampo. Jen ĝi: kaj lumo! La antaŭĉambro vere malplaĉe aspektis. Sur la planko kuŝis malnovaj gazetoj kaj kovertoj, sur la ununura seĝo ies ĝinzo, ŝtrumpetoj, mamzono. La persono, kiu luigis al Xin sian ĉambron, evidente ne havis tempon ordigi. Per la telefono ŝi diris nur, ke Xin rajtos uzi unu ĉambron en



kvarĉambra ĉelaro, kaj la kuirejon kaj la banĉambron, kompreneble. La prezo ne estis alta, 50 eŭroj por la 10 tagoj, sed ion pli agrablan Xin certe imagis, kiam ŝi pagis.

Malkontenta, Xin prenis la vestaĵojn de sur la seĝo, kaj faligis ilin surplancken. Ŝi sidiĝis kaj suspiris, deprenis la ŝuojn, la ŝikajn altkalkanumajn ŝuojn, kiujn ŝi aĉetis en Londono tuj antaŭ la ekflugo. Ili vere plaĉis al ŝi, kvankam ŝi divenis, ke ili ne estas tre komfortaj. Ŝi ankoraŭ ne deziris konatiĝi kun la provizora apartamento. Fermante la okulojn, ŝi unue provis malstreĉiĝi kaj ripozi, malgraŭ la soifeto, kiun ŝi de longe sentis en la gorĝo. En la domo

estas varme kaj kviete. Strange silente.

Rekonsiderante sian eventoplanan tagon, Xin estas kontenta, ĉar la intervjuo ĉe la dungisto sukcesis. Ŝi rajtas gratuli sin. Ŝi sukcesis konvinki la dungiston de multnacia konstrufirmao pri siaj kapabloj paroli angle, traduki tekstojn ĉinen kaj el la ĉina, pri sia fidindeco kaj laboremo, pri siaj scioj. Ne vane ŝi diligentis dum la studjaroj, unu kaj duono en Finnlando kaj la ĵusa duonjaro en Britio. De ĉie ŝi havis bonajn atestojn. Kaj ĉi-matene ŝi longe staris antaŭ la spegulo en la necesejo de la flughaveno, taksante sian aspekton. Strikta jupo helbruna, ne tro mallonga, helflava longmanika bluzo, la

novaj ŝikaj ŝuoj, nur iom da ruĝo. Ŝiaj nigraj brovoj kaj okulharoj ne bezonis ŝminkon. Ŝi aspektis kompetenta, memfida, kvankam tre juna. Ĉu juneco estas avantaĝo aŭ male? Ŝia vizaĝo estas preskaŭ infaneca, tion ŝi scias, sed pri sia ĉineco ŝi ne hontas. Ŝia glata brile nigrega hararo ĉie kaptas atenton, same ŝiaj okuloj. En la okcidenta mondo Xin sentas sin ekzota kaj ofte eĉ admirata, kvankam kelkfoje okazas miskomprenetoj pro la lingvoj: finna, sveda, angla, ĉina. Nur unu-du esperantistojn ŝi renkontis.

La pepado de poŝtelefono vekas Xin. Ŝi ne tuj memoras, kie ŝi estas kaj kio okazas. Kaj kioma horo estas? Ĉu ▶

Poemaro pri la vivo



Poemaro pri feliĉo, pri rememoroj, pri la naturo, multaj eroj kun ekologia inspiro. Fine poemoj pri malpaco, pri poluado, pri komerco kaj konsumado, pri atomenergio kaj Eŭropo ankaŭ apartenas al la penso de Rejna. Poezio tre simpla, jen ritma, jen senritma. Troveblas kelkaj aludoj al aliaj poetoj en ŝiaj poemoj.

Rejna de Jong estas persista poetino kun aparta voĉo. Plia virina voĉo gravas, eĉ se voĉeto modesta, minora.

Chris Declerck

Paĝoj: 76; 21 cm; vinktitaj;

Prezo: € 10,00

Informoj:

tlf. +32 3 234 34 00;

tlc. +32 3 233 54 33;

rete: butiko@fel.esperanto.be

<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

► jam mateno? Ne estas malhele. Ŝi iom dormetis, kaj sonĝis pri Ŝanhajo, pri siaj hejmo kaj gepatroj. Gefratojn ŝi ne havas. La unu-infana politiko, vi scias. La gepatroj atendas multon de la inteligenta filino, ili investis en ŝi, ili ne estas malriĉaj, sed kaj al ili kaj al Xin la plej granda ofero estas la plurjara disiĝo. Fakte, tio estas kvazaŭ vetludo je danĝere altaj sumoj. La telefono re-pepas kaj Xin komprenas, ke ĝi estas la ŝia. Ŝi elpoŝigas ĝin kaj vidas, ke estas iom post la 22a horo kaj ke iu al ŝi sendis tekstmesaĝon dufoje. La mesaĝoj estas en la angla. *Would you like to have lunch with me tomorrow?* (Ĉu vi ŝatus lunĉi kun mi morgaŭ?) La sendinto ne metis sian nomon. Tio ja ne estas ĝentila, Xin iom timas mesaĝojn de nekonatoj. Antaŭ longe en Ŝanhajo iu viro bombadis ŝin tekstmesaĝe kaj telefonvoke per pli kaj pli aŭdacaj proponoj kaj demandoj. Tiam ŝi decidis ŝanĝi sian telefonnumeron. Estis komplike kaj ege malagrabla. Xin ĉion tion memoras tro bone. Ĉu denove? Rilate virojn ŝi estas tre singarda. Ne, ŝi ne volas kontaktiĝi. Nepre ne! – Ĉu la ĵusa mesaĝo povus esti eraro, ŝi ja ne facile donas sian numeron al homoj? Malŝaltante la telefoneton, ŝi provas konvinki sin, ke ne al ŝi estis la mesaĝo.

La plifortiĝanta soifo pensigas Xin pri la kuirejo. Kiu pordo kuirejen? Ĉu tiu kun malpura viŝtuko surprorde? Xin malfermas: jes, jen la kuirejeto, sed ĉiel malorda. Nelavitaj teleroj kaj tasegoj sur la lavtablo, sekiĝintaj kaseroloj sur la elektra fornelo, uzitaj forkoj kaj kuleroj. Kial ili ne purigis antaŭ ol ekferi? Kvankam la luprezo estis malalta, ili ne rajtus trakti la luanton tiel ĉi. Xin ekkoleras. Ŝi rigardas en la fridujon. Ĉu ili lasis ion en ĝi? Sukon, botelakvon. Xin ne scias, ĉu la kranakvo ĉi-urbe estas trinkebla. Staras skatolo da suko sur unu el la bretoj, sed la odoraĉo de la fridujo naŭzas ŝin. Acidiĝinta lakto, tranĉaĵoj de dubinda viandaĵo, ŝimantaj karotoj kaj pano, makuloj de rompiĝintaj ovoĵoj ... Xin rapide fermas la pordon, tiun sukon ŝi ne trinkos. En la dorsosako ŝi havas oranĝon kaj pomon. Tio sufiĉu, kaj la kranakvon ŝi trinkos, supozeble ĝi estas trinkebla,

laŭdire ĉie en Finnlando tiel estas. Xin enrigardas en la kvar ĉambrojn. Nur unu estas ordigita, kaj sur la tablo ŝi trovas papereton por si. „Bonvenon, WEN Xin! Estu kiel ĉe vi!” Kaj iu nomo. Xin ne bone rekonas ĉi-landajn nomojn, se ili ne estas tajpitaj. La ĉambro havas grandan fenestron. Ekstere brilas la suno trans blua akvovastaĵo. Tio devas esti la Golfo de Finnlando. Belege, sed se Xin ne scius, ke tio estas la maro, ŝi pensus, ke tio estas granda lago kun verdaj arbarkovritaj insuletoj. La suno preskaŭ tuŝas la arbosuprojn en la horizonto. Pli proksime videblas du blankvelaj ŝipetoj. La vidaĵo estas nekredeble trankvila. Se ŝi malfermos la fenestron, ŝi ne plu sentos la mucidan haladzon de la apartamento. Sed ĉu ŝi povos endormiĝi en tiu ĉi fremda lumo, kiu falas oblikve sur la liton? Nek persieno nek ŝutro troveblas.

Xin vekigiĝis. Plu estas lume. Kia stranga nokta lumo! La horloĝo montras la unuan horon. Ĉu eblas? El la korto aŭdiĝas ritma bruvo de tamburo kaj viraj voĉoj. Xin rigardas el la fenestro. Sur la asfaltita senaŭta parkejo dancas kvino da nigrahaŭtaj altaj viroj. Devas esti afrikaj studentoj el iu alia studenta ĉelaro. Neniam Xin vidis tian fortegan dancadon. Kaj apud la tamburego staras trinkboteloj. Ĉu ili drinketis? Kial ili tiel bruegas? Certe ankaŭ ili sentas sin solaj en fremda lando kaj provas forgesigi al si la hejmsopiron. Surprize, ke neniu venis malpermesi la tamburadon. Subite la poŝtelefono en la ĉambro sur la noktoblablo repepas. Denove la mesaĝo de la nekonato: Ĉu ni tagmanĝetu kune? Kaj neniu nomo, nur nekonata numero. Ĉu iu el la sovaĝaj dancantoj vokis ŝin? Ne, ŝi ne ŝatas pensi pri tio, ŝi ne ŝatas aŭdi la tamtamon, nek vidi la preskaŭ nudajn korpojn, ritme moviĝantajn. Ŝi ektremas pri sia seku-reco. Kiam estos vera lumo, normala tago? Ne plu eblos dormi, nur pensadi, tremadi, atendi matenon. Ŝi bezonas freŝan trinkaĵon kaj ion por manĝi. Ŝi devigas sin koncentriĝi kaj plani la sekvan tagon, por ne paniki.

Matene, serĉinte vendejojn ŝi povas nur konstati, ke ĉiuj estas fermitaj, kun blanka slipo sur la pordo „*Juhan-*

nuksena suljettu". Kutime ili sabate estas malfermaj de la 9a matene ĝis la 18a, sed nun „*suljettu*". Fermitaj! Ĉiuj! Kioskoj fermitaj, poŝtoŝtanco fermita, kaj neniuj lokanoj en la strato. Kion signifas „*juhannuksena*”? En la vortaro troveblas nur „*juhannus*”, somermeza festo. (Nur poste ŝi scios, ke ĝi estas la dua plej granda festotago de la jaro, kiam urboj senhomiĝas, ĉar finnoj ferias kampare, mare, ĉe lagoj.) Sur pluraj flagostangoj flirtas la landa blublanka standardo, sed tio ne gajigas Xin. Malcerto kaj timo ĝermas en ŝia koro. Ŝi ne multe dormis post la unua horo. La fremdeco turmentas ŝin. Nun ŝi sentas sin malforta kaj malsata. Eĉ la bela vetero ne ĝojigas. Rapide ŝi paŝas preter la tamburego kaj la malplenaj boteloj. Ili odoras je vino. Ŝi nur deziras ŝlosi sin en la luita ĉambro. Se nur sian nazon ŝi povus ŝlosi ...

Ĉe la pordo ŝi resentas la haladzon, memoras la naŭzajn kuirejon kaj fridujon. Kiam ŝi kuŝiĝas sur sia lito kaj fermas la okulojn, la tamburado rekomenciĝas, plifortiĝas, plirapidiĝas. Eĉ sen elrigardi, Xin en sia kapo vidas la nigrajn atletajn korpojn, kiuj en ŝorto kaj sen ĉemizo kaj ŝuoj ritme moviĝas. Estas varmege, sed ŝi tremas, esploras. Ĉiuj ŝiaj geamikoj loĝas alilande. Ŝi ne volas telefoni al ili, lasi ilin rimarki, ke ŝi ne plu kapablas regi sin. Ŝiaj studado kaj nova posteno ja devas esti venko, io, pri kio oni ĝoju, kion oni enviu. Neniu sciu, ke la sukceso minacas maliĝi. El ŝia gorĝo eliĝas plorego. Timante, ke ŝi ne povos bridi sian kreskantan timegon, Xin komprenas, ke ŝi nepre kontaktu iun por elverŝi sian koron. Se ne, paniko kaptos ŝin. Malrapide ŝi serĉas la numeron de la maljuna esperantistino, kiun ŝi renkontis antaŭ duonjaro multe pli norde en la lando. Ĉu ŝi respondos? Ĉu iu respondos en tiu ĉi ŝajne senhoma medio?

La amika voĉo de la sinjorino igas Xin esplori denove. Ne tuj estas facile kompreni unu la alian. Kion la sinjorino povus fari? Ŝi loĝas 500 kilometrojn for de la urbo Esbo. Almenaŭ kompreni kaj komprenigi la situacion al Xin ŝi provas, kvankam malrapide kaj ne kun kompleta sukceso. Ĉe Xin, malsato, soleco, tro da fortaj travivaĵoj dum mal-



longa tempo, laco kaj komenciĝanta terurigo; en la lando, feriado, festego pro la somera solstico; nur lunde la vivo normaligiĝas. Feliĉe la sinjorino havas fratinon kaj bofraton en Esbo. Xin nur donu sian adreson, kaj ili venos vidi, ĉu eblas iel helpi. Xin absolute duonhoron. La tamburado kaj krioj aŭdeblas eĉ tra la telefono.

Oni sonorigas ĉe la pordo. Tra la malgranda elrigardilo Xin vidas mezaĝajn virinon kaj viron. Ili prezentas sin, kaj ŝi malfermas. Ŝi preskaŭ ĵetiĝas al ili por saluti, la virino malpeze ekkaresas ŝian hararon, provante trankviligi la knabinon per malrapidaj sekurigaj vortoj en Esperanto. Iom post iom ili interkompreniĝas. Xin venu al la esperantistoj por ripozi kaj manĝi. Ne vera regalado, ĉar ankaŭ ili ferias, pagajis en la arkipelago por celebri *juhannus*, sed en ilia urboparto estas kviete, kaj Xin sentos sin sekura

ĉe ili. La aŭto atendas en la parkejo. Xin malŝaltu sian telefonon por ne plu ricevi tekstmesaĝojn de la sintrudanto. Ŝi nur prenu sian dentobroson kaj piĝamon, kaj ek!

Lundon matene, kiam Xin eliras el sia ĉelaro, ŝi renkontas unu el la afrikanoj, kiu salutas ŝin per pardonpeta rideto: „Ĉu ni ĝenis vin? Vi estas nova. Ni eble tro bruis antaŭhieraŭ. Tio ne ripetiĝos.” En la oficejo de la konstrufirmao, la vira sekretario de la dunginto salutas Xin: „Kial vi ne respondis miajn tekstmesaĝojn? Mi deziris plifaciligi vian semajnfinojn en tiu ĉi fremda lando, sed vi nur malŝaltis. Mi vere ŝatus konatiĝi kun vi, Wen Xin. Ne estas facile alkiutiĝi al fremda urbo, precipe ne dum finna Johano-festo. Sed ni parolu pri tio pli poste, ĉu ne? Nun mi konatigos vin kun niaj oficejoj kaj labormanieroj.”

(2005)

SALIKO

Sudoku-puzloj

Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoku? Esperanto-sudoku estas sudoku-puzlo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto“! Enigman libreton kun 80 diversaj sudoku-puzloj, kun ciferoj, sed ankaŭ kun diversaj alfabetoj, vi povas gajni, se vi solvos la

ĉi-subajn puzlojn. Sendu la ciferojn, kiuj aperos en la kvadratetoj, indikitaj per A, B kaj C, antaŭ la fino de majo 2006 al la redaktoro de la rubriko: Jean Pierre VandenDaele, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, aŭ rete al jp@fel.esperanto.be.

A			8			3		4
	6				1			
4				6	3	8		1
5		2	3					6
	7		1		2	9	4	8
	1		6	B	4	5		
2				1	9		5	
7		5				2		C
	9	1		3	5			

	6				1	8		
A		5	3		6		7	
2	1	3	8			6		9
		2	6	4		5		
		1	5	B	2			
5	9							6
		8		7	3		C	
7				8		3	2	1
			1					4

A	4			7	8	9		1
1	9					5		
3				1			2	6
		7			4	2	9	
9			5	B			8	
4		1		8			5	
		3			6	8		2
	6			3				5
		4	7		2	C		

Solvo de la julia enigmo

1: 24; 2: 1,00; 3: bronzo; 4: animaloj; 5: 80; 6: C; 7: Ĉ; 8: B; 9: Ĉ; 10: sep fojojn. Triono de la senditaj solvoj estis ĝustaj. Gajnis premion Angus Wilkinson (Britio), Ronald Gates (Aŭstralio) kaj John M. Weeks (Usono).

Solvo de la novembra enigmo

4	1	6	7	5	8	3	2
9	5	2	8	3	6	7	4
8	7	3	2	1	4	9	6
2	6	9	3	4	7	5	8
5	3	8	9	6	1	2	4
7	4	7	5	2	8	6	9
3	2	5	6	7	9	4	8
6	8	4	1	5	3	7	2
7	9	7	4	8	2	3	5

JPvdD

ANONCETOJ

Kara Manjo! Okaze de via naskiĝtago ni donacas al vi jarabonon al Monato, kun tiu ĉi anonco en la unua numero! Ĉuu ĝin dum la tuta jaro kaj pensu pri ni dum via restado en Majorko! Xavier, Manuel kaj Valentin.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Facilaj donacoj por viaj korespondamikoj: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas librokuponoj en kiu ajn sumo, kiun oni oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL (www.retbutiko.net), kaj donacuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provexemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Iház, F. u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

LA ONDO
DE ESPERANTO

Abonebla kontraŭ
27 EUR,
30 USD aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA,
UFE, EAB, SEF kaj
dudeko da aliaj landaj
perantoj.

La ondo de esperanto

Ĉiujmonata soci-kultura revuo en Esperanto

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- * Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- * Tra Esperantujo
- * Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikajoj
- * Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- * Historio kaj kulturo de Esperanto
- * Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- * Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- * Literatura suplemento jarfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6687

LA GAZETO

MONDKULTURA SENDEPENDA ESPERANTISMA

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

gazeto@aol.com

<http://www.lagazeto.com>

Komencanto

komencanto@r66.ru

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj.
Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaĵoj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998 — Formato A4, 16 paĝoj

Abontarifo: **15 eŭroj**
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo: www.Komencanto.narod.ru

Abonu ĉe UEA
aŭ ĉe via landa peranto

Poŝta adreso: KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg, 620041 Rusio

La retbutiko de FEL ekzistas 10 jarojn!

La 9an de februaro 2006 la Retbutiko de FEL ekzistas 10 jarojn!

Por tion festi, ni organizas grandan literaturan enketon kun premioj de **100, 50 kaj 25 eŭroj!**

Premioj: 100, 50 kaj 25 eŭroj!

Tri partoprenantoj, kiuj plej akurate respondis la konkurso-demandon, ricevos premion, ili rajtas aĉeti en la Retbutiko FEL-eldonaĵojn en la valoro de respektive 100, 50 kaj 25 eŭroj!

Kion fari?

1. Krozu antaŭ la 31a de marto 2006 al www.retbutiko.net kaj plenigu la enketilon pri viaj plej ŝatataj libroj.
2. Respondu la konkurso-demandon:

“Kiu estas la sumo (en eŭroj) de la prezoj de ĉiuj varoj en stoko en la Retbutiko je la 9a de februaro 2006, se de ĉiuj eroj nur unu ekzemplero estas kalkulita?”

Ĉiuj esperantistoj en la mondo estas invitataj partopreni la enketon, organizitan de la retbutiko de FEL (Flandra Esperanto-Ligo): www.retbutiko.net

Per la enketo, ni volas kompili liston de la plej popularaj libroj en Esperantujo nuntempe.

Reguloj: ĉiu esperantisto rajtas sendi nur UNU enketilon. Ŝanĝoj en jam sendita enketilo NE estas akceptataj. Enketiloj kiuj alvenas post la 31a de marto NE validas.

Rezultoj: La tri gajnintoj ricevos personan mesaĝon. La rezulto de la granda enketo aperos en MONATO.